

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

111-a jaro • n-ro 1320 (1) | januaro 2018

Novaj sukcesoj de Esperanto ĉe Unesko

La Esperanto-movado
havas longan historion de
kunlaboro kun Unesko.
Nun kunagado de UEA,
TEJO kaj Unesko eniras
novan aktivan fazon | 10

Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Kultivi movadon indan je
fiero | 3

La 47-a Malferma Tago kaj Seminario pri Informado en la Centra Oficejo

Volontuloj Hoan Tran
kaj Li Lu rakontas pri la
tradicia aranĝo | 5

Antaŭ dek jaroj mortis Claude Piron

Mireille Grosjean
kaj Renato Corsetti
rememoras pri unu el la
plej grandaj esperantistoj
en la historio | 18



39^e session
Conférence
générale

Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek
Foto sur la kovrilpaĝo: © UNESCO/Christelle ALIX

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
faks.: +31 10 436 1751
<http://revuoesperanto.org>
revuo.esperanto@gmail.com

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (EUR 41);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.
Anoncoj: 1€ por ĉiu vorto. Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A
(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)
PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.
+31-10-436-1044 +31-10-436-1751
uea@co.uea.org www.uea.org



3

Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Kultivi movadon indan je fiero.
Mark Fettes rakontas pri tio, kiel UEA
kaj TEJO akuis Esperanto-komunu-
mon kaj komunikas pri la novaj ŝanĝoj
kaj renovigoj, kiuj atendas UEA en la
nova 2018-a jaro.



5

La 47-a Malferma Tago kaj Seminario pri Informado en la Centra Oficejo

Volontuloj de la CO, Hoan Tran kaj
Li Lu, rakontas pri la tradicia aranĝo
kaj la Seminario pri Informado, kiu
sekvas ĝin.



10

Novaj sukcesoj de Esperanto ĉe Unesko

La Esperanto-movado havas longan
historion de kunlaboro kun Unesko.
Nun kunagado de UEA, TEJO kaj Une-
sko eniras novan aktivan fazon. La re-
dakcio de *Esperanto* retrospektas kaj
intervjuas la aktivulon Rakoen Maer-
tens.



18

Antaŭ dek jaroj mortis Claude Piron... La bona kaj simpla esperantisto

Mireille Grosjean kaj Renato Corsetti
rememoras pri unu el la plej grandaj
esperantistoj en la historio de Espe-
ranto. La unua artikolo enhavas bi-
ografiajn faktojn kaj rememorojn. La
dua temas pri lia verkaro.

Universala kongreso 4
Kongresa temo en
Lisbono: Kulturoj, lingvoj,
tutmondigo: kien nun?

AMO 6
AMO restas amase amata
tra 2017

Recenzo 8
Plia verda kabaredo
Oficiala Informilo

Afriko brilas 9
Pri miaj streboj enradikigi
Esperanton en Rutshuru,
malgraŭ teruraj
malsekurecoj

Unesko 14
Unesko-kuriero en
Esperanto sukcesas

Universala kongreso 15
103-a Universala Kongreso
de Esperanto, 28 julio-4
aŭgusto 2018
Lisbono, Portugalio

Recenzo 16
Pri ĥomej insektoj, lumo
kaj krizalido

ILEI 17
Nova situacio, nova laboro
por ILEI

Kalejdoskopio 20

Lingvo 22
Lingvaj rimarkoj

Esperanto en
universitatoj
Du priesperantaj prelegoj
en scienca konferenco

Faka agado 23
Esperanto en regiona
Parlamento de Brazilo
Forpasoj

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Mark Fettes,
2658 E 21st Av, Vancouver BC, Kanado.
VSM 2W1; +1-778-928-4489
mtfettes@sfu.ca

Vicprezidanto: S-ro Stefan MacGill,
Berlini u. 43
Budapest, HU-1045, Hungario.
stefan.macgill@gmail.com. Nur mesa-
ĝoj al tiu adreso ricevos atenton.

Membro: D-ino Sara Spano,
393 Beacon St
Boston MA 02116, Usono.
mariarosaria.spano@gmail.com

Membro: S-ro Emilio Cid,
R. Julio Prestes 904, 11390-150 São
Vicente - SP, Brazilo +5513-99778-
7367 cid.emilio@gmail.com

Membro: S-ro LEE Jungkee,
401 dong 301 ho Donggyun-ro 135,
Dongan-ku, 431-907, Anyang-si,
Kyungki-do, Korea Resp. +82 10 3340
5936 leejungkee@khu.ac.kr

Observantoj de TEJO: S-ro Francesco
Maurelli, S-ino Charlotte Scherping Larsson

Observanto de ILEI:
S-ino Mirejo Grosjean.

**La estraranoj respondecas pri la jenaj
difinitaj aspektoj de la asocio politiko:**
D-ro Mark Fettes: Strategio, Kunordigo,
Statuta Reformo, Esploro kaj
Dokumentado, Faka kaj Scienca Agado.


Stefan MacGill: Instruado, Jaro de
la Lernanto, Meza Oriento kaj Norda
Afriko, Rilatoj kun Membro-Organizoj,
revuo Esperanto

D-ino Sara Spano: Eksteraj Rilatoj,
Aktivula Maturigo, Eŭropo,
Terminologio, Kulturo kaj Kongresoj,
Gemelaj Urboj.

Emilio Cid: Informado, Amikoj de
Esperanto kaj Zamenhof-Jaro.

LEE Jungkee: Azio, Afriko kaj
Esperanto-Centroj.

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>



■ Mark Fettes

Unu el la plezuroj de nia movado estas la renkontiĝoj kun novuloj — kun homoj, kiuj nur en la lastaj monatoj malkovris la lingvon kaj ĝian komunumon. Tra iliaj okuloj oni povas dum momento revidi Esperanton freŝa, pura, netuŝita, kiel ĝardeno sub ĵus falinta neĝo.

Dum novembra vizito al la Centra Oficejo, mi parolis kun unu el la volontuloj de TEJO, junulino kiu antaŭ kelkaj monatoj tute ne konis la lingvon. Spontane ŝi komentis pri la vojaĝrakontoj, kiujn ŝi aŭdis de pli spertaj movadanoj: “Ĉiam ili parolas pri la specifaj homoj, kiujn ili renkontis. Tio por mi estas bela. Oni ne vidas unue la naciecon de la persono, sed ĉiam la homon.”

Venante al la fino de la Zamenhof-Jaro, estas bele kaj esperige, trovi en la buŝo de novvarbita tian konstaton. Ĉar kompreneble ĝuste tio estis la etika kerno de la zamenhofismo: lerni vidi la homecon de ĉiu persono, preter la

Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Kultivi movadon indan je fiero

vestoj de religio, nacieco kaj lingvo. Se ĵusveninto povas rekoni tiun valoron en la ĉiutaga vivo de la movado, senrigarde al teorio aŭ merkotiko, tio ja indas je fiero.

Akuŝistoj de la moderna E-komunumo

Antaŭ preskaŭ 110 jaroj, UEA estis fondita ĝuste por doni organizan kadron al tiu etika kerno. La fondinto Hodler vidis, ke la naciaj societoj nur parte povas plenumi tiun rolon; oni bezonas asocion, en kiu ĉiu esperantisto povos senpere membriĝi. En lia vizio, UEA estu samtempe praktika rimedo kaj potenca simbolo de nia komuna homeco — organizo per kiu la movado iom post iom difinu sian propran vojon.

Se ni rerigardas al tiu pli-ol-cent-jara historio, ni vidas sukcesojn kaj malsukcesojn, brilajn kaj malbrilajn periodojn, kiel en la vivo de ĉiu homa institucio. Tamen, el la lastaj sepdek jaroj elstaras la rolo, kiun UEA ludis en la tutmondiĝo de Esperanto, subtenante aktivulojn kaj movadojn en ĉiuj kontinentoj kaj provizante per kadroj por transnacia kundiskutado, trejnado kaj kunlaboro. Notindas ankaŭ ĝia daŭra flegado de nia kulturo en monda skalo, helpante al verkistoj, muzikistoj, aktoroj kaj aliaj trovi internacian publikon por siaj kreaĵoj. Kaj al tio necesas aldoni ĝian subtenon al la junulara movado, al TEJO, kiu per UEA ricevis la bazan financon kaj administran stabilecon por permesi disvolviĝon kaj elkreskon al memstara asocio.

UEA kaj TEJO estis do akuŝistoj de la moderna Esperanto-komunumo, kiu jam vivas kaj disfloras preter ĉiuj organizaj kadroj. Se ambaŭ malaperus morgaŭ, mi ne dubas, ke la movado sukcesus krei novajn instituciojn por plenumi la samajn aŭ similajn celojn. Sed samtempe necesas agnoski, ke niaj atingoj estas limigitaj. Ne venis

la granda ondo de membriĝoj, kiujn oni povus esperi pro la disvastiĝo de Esperanto en interreto. Informado pri Esperanto restas plejparte en la manoj de lokaj amatoroj, foje talentaj, sed ofte neorientitaj pri modernaj metodoj de komunikado kaj varbado. Milionoj da homoj, kiuj trovas la lingvon interesa kaj alloga, neniam renkontas prezenton kiu motivus ilin eklerni. Kaj samtempe multaj tradiciaj asocioj kaj agadformoj velkas iom post iom, pro la aĝiĝo de la gvidantoj kaj sia nekapablo varbi novulojn.

Daŭrige kaj renovige

Ni do trovas nin en tempo de gravaj defioj. Interalie, la financoj de UEA malpliboniĝis en la lastaj jaroj, pro evoluoj en la monda ekonomio kune kun la malrapida ŝrumpado de la membraro. UEA ankoraŭ posedas sufiĉe grandan kapitalon, sed ĝi riskas eroziigi pro konstantaj jaraj deficitaj, se ni ne sukcesos trovi novajn fontojn de enspezoj aŭ draste tranĉi la elspezojn. Streboj en tiu direkto multe okupos la Estraron, Oficejon kaj Komitaton dum la jaro 2018. Por nia nova Ĝenerala Direktoro Martin Schäffer, financa resanigo estos inter la ĉefaj prioritatoj.

Ankaŭ al aliaj defioj ni entreprenas respondi, daŭrige kaj renovige. En tiu ĉi jaro UEA lanĉos sian novan retejon, kun diversaj servoj, alireblaj per poŝtelefono, kaj daŭrigos sian laboron por trejni aktivulojn kaj kunordigi la laboron pri informado kaj eksteraj rilatoj, agadkampoj kiuj plej rekte influas la disvastiĝon de Esperanto kaj la alfluon de novaj membroj. Samtempe ni subtenos diversajn iniciatojn por festi la Jaron de la Esperanto-Kulturo, inter kiuj sendube elstaros la 103-a UK en Lisbono. En Azio kaj Afriko ni planas novajn paŝojn por subteni kaj plifortigi lokajn kaj landajn movadojn, pri kiuj vi baldaŭ povos legi en ĉi tiu

revuo. Malgraŭ ĉiu “malfacila vento,” la agado antaŭeniras.

Kaj tio ja ne estas agado nur por “la centra UEA” — tio estas agado por ĉiuj. En tiu ĉi renoviga jaro, gravas montri vian subtenon per (re)membriĝo, kaj eventuale krome donaci por apogi specifajn agadojn, aŭ simple por kontribui al nia financa plifortigo. Gravas partopreni en la Jaro de la Esperanto-Kulturo, eventuale per aĉetoti

ĉe la Libroservo aŭ aliĝi al la Kongreso. Gravas pliprofundiĝi vian konon de la lingvo kaj la movado, kaj sur tiu bazo ankaŭ iel kontribui al la informa agado, ĉu loke ĉu rete. Gravas diskonigi jamajn sukcesojn kaj kunlabori por atingi novajn. Sen via partopreno kaj kunagado UEA ne povas progresi.

Plej grave: ni devas ne forgesi, kial Esperanto valoras la penon. Se nova volontulo povas tiel klare vidi

la belon en nia movado, ni senhezite agnosku kaj kultivu tiun belon. Nia nuna dolorplena mondo ja bezonegas ĉiujn rimedojn, kiuj helpas la homojn kompreni kaj estimi unu la alian. Se nia agado kontribuas al tiu celo, eĉ se ankoraŭ en relative modesta skalo, ĝi sendube indas je fiero.

Feliĉan, fieran kaj agadplenan novan jaron al ĉiuj!



¿Hacia una lengua para Europa? El futuro de la babel europea
Mark Fettes
La Habana, 1991. 24 paĝoj, 21 cm
1,50 €, sesona rabato ekde 3 ekz.

Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo
Mark Fettes
Rotterdam, 1991. 15 paĝoj, 21 cm
2,10 €, triona rabato ekde 3 ekz.



Universala Kongreso

**Kongresa temo en Lisbono:
Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?**

Kiam la portugala maristo Vasco da Gama atingis la bordojn de Barato (por eŭropanoj, Hindio) antaŭ 520 jaroj, li malfermis novan epokon en la monda historio. Dum longa tempo tiu aspektis kiel epoko de la Eŭropa Konkero, ĉar la grandaj maraj imperioj de Britio, Francio, Nederlando, Hispanio kaj Portugalio sukcesis ekregi sur granda parto de la terglobo. Kun iliaj soldatoj, pastroj, komercistoj kaj burokratoj disvastiĝis ankaŭ la imperiaj lingvoj kaj kulturoj, influante la vivon de miliardoj da homoj, ne nur dum la zenito de la eŭropa potenco, sed ankoraŭ nun.

Tamen la procezo de tutmondiĝo ne haltis ĉe la starigo de la grandaj imperioj kaj iliaj kolonioj. Iom post iom, ŝajne nehaltigeble, ĝi interplektis ĉiujn homajn sociojn, tiel ke ankaŭ la originaj hejmlandoj de la koloniintoj fariĝis multetnaj, multlingvaj, multkredaj. Dume la progreso de la komunikaj teknologioj malfermis novajn kanalojn por

la reciproka influado de socioj ie ajn en la mondo, disvastigante interalie la komprenon, ke ni ĉiuj loĝas sur unu malgranda planedo.

Tiel, almenaŭ, ni ŝatus kredi — ni esperantistoj, internaciistoj, kredantoj kaj praktikantoj de la frateco de l' homaro. Se ni rigardas ĉirkaŭ ni, tamen, ni vidas ke multaj homoj fakte timas tiujn vizion kaj realon de interplektita mondo, kaj rifuĝas al imagoj pri sia propra supereco, pri sia kapablo forfermi la fremdulojn. Lingvoj kaj kulturoj fariĝas batalililoj por tiuj homoj, rimedoj por distingi la amikon de la malamiko, pordoj kiuj enlasas nur la elektitojn. Aŭ, eventuale, rimedoj por daŭrigi la kolonian regadon en aliaj formoj, formoj profunde integritaj en la monda ekonomia kaj politika sistemoj.

Kontraste al tiuj flankoj de la tutmondiĝo, diversaj sociaj movadoj kaj kulturaj tendencoj prezentas alternativan evoluojon, al daŭripova mondo bazita sur justeco ekonomia kaj

ekologia. Tiuj voĉoj estas ĉie rekoneblaj, foje eĉ influaj. Sed pri lingva kaj kultura diverseco ili ofte parolas nur svage kaj ĝeneralige, en la iamaj koloniaj lingvoj, supozante ke sufiĉas komunaj idealoj kaj valoroj por venki ĉiujn problemojn. Male al troa malfido pri siaj kunhomoj, ili tro multe fidis al sia kapablo forlumi la ombrojn de la historio. Kulturoj kaj lingvoj tamen, ĉiam kaj ĉie, kuntrenas la pasinteco kun si.

Kien, do, nun? Ĉu ni esperantistoj, kunposedantoj de lingvo kaj kulturo jam denaske tutmondismaj, povas disvolvi novan, konvinkan vizion pri la estonteco? Kaj kiel ni nutru kaj gvidu la evoluon de nia propra kulturo, por ke ĝi estu inda je tiu vizio? La kongresa temo de Lisbono donos al ni abundajn okazojn por preparoli la interplektiĝon de la esperantista vivo kun tiu de la mondo ĉirkaŭ ni, kaj interŝanĝi spertojn kaj perceptojn pri la plej signifaj lingvaj kaj kulturaj evoluoj de nia epoko. Venu navigi tiun maron kun ni!

La 47-a Malferma Tago kaj Seminario pri Informado en la Centra Oficejo

■ Hoan Tran kaj Li Lu

Ĝis nun la Centra Oficejo jam 47 fojojn okazigis la Malferman Tagon kaj la cifero bone pravas, ke la Tago estas ja tradicio, kaj nemalhavebla aranĝo en la kalendaro de la plej atendataj eventoj en Esperantujo.

Oni povas diri, ke la Malferma Tago estas konsiderata kiel grava festo por la CO-anoj, pro tio, ke ni havas multajn gastojn, kiuj vizitas «nian domon». Vere interesis min la etoso de preparado antaŭ la Tago. Ni kune purigis ĉambrojn, rearanĝis spacon en la CO por bonvenigi esperantistojn. Iuj zorgas pri aĉetumado, iuj pretigas teknikajn aferojn por la prelegoj, iuj akceptas la unuajn alvenintojn ĉe la stacidomo. Aldone, en la retaj kanaloj de UEA, esperantistoj konigas la informojn pri la evento, diskutas pri diversaj temoj kaj vojaĝo al la CO. Ŝajnas al mi, ke la tuta mondo turnas sian atenton al la 176 Nieuwe Binnenweg de Roterdamo, Nederlando. Estas mose, ĉu ne?

prelega temo de Amri Wandel estis “Kosmo kaj ni: novaj perspektivoj de vivo ekstertera” kaj la temo de Marija Belošević estis “Verkaro de Lucija Borčić”. Krome, ankaŭ la volontulinoj de la Centra Oficejo prezentis interesajn kaj kolorajn prelegojn, ekzemple Fériel Djenidi kaj Roxane Romann faris prelegon kun la temo “Kara Akademio,” kaj “El Brezando ĝis Samarkando”, Hoan Tran raportis pri la agadoj de TEJO, Nicoleta Enache kaj Hoan Tran raportis pri detaloj de Varbiloj en kaj pri Esperanto, kaj Lucia Li prezentis la detalojn pri ĉiutagaj laboroj, radiaj programeroj kaj kolora enhavo de la retejo de la Esperanta Redakcio de Ĉina Radio Internacia. La ĉeestantoj ĝuis la temon en la Centra Oficejo de UEA, ili aŭskultis kaj ĝuis la prelegojn, samtempe ili ankaŭ havis bonan renkontiĝan temon en la kafejo kun tutaga kafo, teo kaj bongustaj kuketoj. Estas rimarkinde, ke ĉi-foje la Malferma Tago ankaŭ estis vive elsendita ĉe Facebook-paĝo de UEA, tial esperantistoj, kiuj fizike ne ĉeestis, povas ĝui la prelegojn kaj iel la etoson en la CO.

La sekvantan tagon okazis Seminario de Informado. Ĉi-jare, la Seminario enhavas 2 ĉefajn kaj apartajn partojn: matenan kaj posttagmezan. La matena programo daŭras 2 horojn kaj inkluzivas diskuton kaj prelegon pri Informado-rilataj temoj. Por la matena programo kontribuis Nicoleta Enache kaj Roxane Romann, 2 volontuloj de UEA. Nicoleta pli profunde diskutis pri kio vere temas «informi», ĝiaj bazaj elementoj kaj pri kio informanto indas atenti dum la procezo de Informado. Kun fokusiĝo sur flugfolioj kaj faldfolioj, Roxanne donis al la aŭskultantoj interesan scion, ke desegno de varbiloj tute ne aspektas tiel simpla, kaj ŝi prezentis ekzemplojn pri tio kiel etaj desegnaĵoj povas havi grandan efikon kaj influon sur la legantoj. Tiaj temoj laŭ mi estas tre interesaj, vekante scivolon ĉe la ĉe-



estintoj kaj estigante ĉe ili specialan atenton pri tio kiel bone informi, kaj kiel grafikaĵoj povas influi.

Posttagmeze, la dua parto de la Seminario celas ankaŭ neesperantistojn kaj ideale tiam la CO estis tute malfermita al la publiko. Tio estas nova kaj bona ideo por la ĉi-jara Seminario. La programeroj estis bone planitaj, ekzemple Esperanto-lecionoj por komencantoj, lingva testo, kukofarado kaj aliaj ludoj por amuziĝo. Bedaŭre ĉi-foje malmultaj homoj venis; nur 2 komencantoj partoprenis en la Esperantaj lecionoj. Tamen, estas bona ideo, ke ni sciigu al nederlandanoj ĝenerale kaj roterdamoj aparte pri Esperanto kaj la ekzisto de la Centra Oficejo, la koro de la Esperanto-Movado. Pro tio indas daŭre okazigi programon por ne-esperantistoj, utiligi plurajn kanalojn kaj surlokan eblojn por propagando, por ke venontfoje ni povu venigi pli da lokanoj, kaj homoj de najbaraj urboj, landoj.



La 47-a Malferma tago okazis la 25-an de novembro, 53 geesperantistoj el 20 landoj partoprenis. De la deka kaj duono matene ni aranĝis dek prelegojn al la vizitantoj. Ionel Oneț raportis pri la plej novaj novaĵoj de la Libroservo, Roman Dobrzyński faris prelegon pri la temo “Zamenhof en Varsovio”, la prelego de sinjorino Spomenka Štimec donis fokuson al Vasilij Eroŝenko, Rakoen Maertens faris raporton pri “Agadoj ĉe Unesko”, la



Fériel Djenidi kaj Roxane Romann

AMO restas amase amata tra 2017

■ Stefan MacGill
kaj Sara Spanò

Kun sama intenseco kiel en la antaŭa jaro pluiras la trejnprogramo de UEA. Temas pri Aktivula Maturigo, konata (kaj klare amata) laŭ la mallongigo AMO. Tra 2016 kaj 2017 okazis statistike unu trejnseminario ĉiu-



La 11-a MER kaj
la 40-a AMO-Seminario, Moskvo

monate, pro la senĉesa deziro venanta el plej diversaj mondpartoj. Depost la lanĉo en marto 2014, okazis laŭjare 8, 9, 12 kaj 12 seminarioj, do fine de 2017 okazis jam 41 el ili. En 2017 la programo atingis kvin novajn landojn: Baraton (Hindan Union), Kartvelion, Korean Respublikon, Rusion kaj Svislandon. La programo tuj post la lanĉo atingis ekstreman geografian varion: la unuaj kvar seminarioj okazis en Eŭropo, Norda Ameriko, Suda Ameriko kaj Azio. Novaj landoj laŭjare sumis je 8, 5, 7 kaj 5, do fine de 2017 tiuj 41 seminarioj okazis en 25 landoj.

En 2017 du seminarioj estis solstaraj (la 30-a en Munkeno kaj la 35-a en Les Brenets), kio estas relative rara pro la pezaj logistikaj devoj. La aliaj ĉiuj okazis kadre de iu alia aranĝo. La 30-a en Munkeno temis unuafoje pri trejnado por trejnistoj en la kampo de plenkreskula edukado (danke al EU-



La 39-a AMO-Seminario, Bengaluru

subvenciita partnera projekto, kunordigita de la Bjalistoka Esperanto-Societo), dum la 32-a okazis kadre de la IJF (danke al EU-subvenciita partnera projekto pri EU-Afrika kunlaboro en la junulara kampo). Ambaŭ seminarioj plenumis la trejnadon de trejnistoj – alivorte SUPER-AMO. Du temis unuafoje pri edukaj temoj (35 kaj 38), unu pri la Zamenhofa jaro (36) kaj unu (34) pri denaskismo – nova temo por AMO. La 41-a seminario en Parizo temis unuafoje pri la eksteraj rilatoj de UEA, kaj aparte pri lertigo de agantoj en la rilatoj kun Unesko.

Historie, la plej granda nombro da seminarioj okazis en Italio kaj Usono (po 4), poste Brazilo kaj Germanio (po 3) kaj Francio, Hispanio, Hungario, Pollando kaj Slovakio (po 2) kun po 1 en 16 pliaj landoj. Laŭkontinente, 3 en Afriko, po 6 en Ameriko kaj Azio, kaj 26 en Eŭropo. Mankas nur Oceanio kaj Antarktio.

Kelkaj seminarioj estis starigitaj kun la celo subteni la landan kaj regionan agadon de UEA, kiu urĝe devas konstati siajn regionojn de malforto kaj direkti rimedojn kaj flegon al ili.

Tio certe validas pri la 31-a seminario en Kutaisi, Kartvelio, por direkti atenton al la kaŭkaza regiono kaj la 39-a seminario en Bengaluru, kie tro longe UEA malfortis kaj ne rimarkis la potencialon por progreso. Argumenteble tio rilatas eĉ al la 40-a seminario en Moskvo; kvankam Rusio havas longan movadan historion, ĝi ne ludas grandan internacian rolon, kaj tio restas fleginda.

Kio konektas Rusion kaj Baraton? Nu, membreco en la kolektivo BRICS. Jen potencialaj kresko-zonoj ne nur por la mondo, sed ankaŭ por UEA. La 3-a AMO-seminario okazis en Brazilo (kiu altiris tri seminariojn), la 4-a en Ĉinio. En 2017 ni aldonas Baraton kaj Rusion. La kvinan landon (Sud-Afrikan) ni relative facile aldonos. En sekva numero de nia revuo ni aperigos artikolon kun analizo kaj konkludaro pri niaj ebloj en la landoj de BRICS.

Spite la malfacilan financon situacion de UEA, la programo pri trejnado eniras sian kvaran jaron kun fido pri senĉesa deziro je seminarioj, kun promeso de pliaj novaj landoj, modpartoj kaj temo – la jaro 2018 devos enhavi la kvindekan seminarion.



La 35-a AMO-Seminario, Les Brenets

AMO en 2017

N	Loko	M	T	H/T	≈PP	Gvid	Temo
30	Munkeno, DE	mar	8	8	15	3	Trejnado por Trejnistoj
31	Kutaisi, GE *	apr	3	3	25	6	Esperanto en la Seminaria Regiono
32	Bergamo, IT	apr	8	10	17	5	Trejnado por Trejnistoj
33	Greziljono, FR	apr	4	5	12	4	Kiel modernigi la instruadon per novaj teknikaĵoj
34	Wrocław, PL	maj	2	2	12	1	La rolo de denaskaj esperantistoj
35	Les Brenets, CH*	maj	4	6	20	4	Atente al Instruado kaj la Jaro de la Lernanto
36	Teruelo, ES	jun	2	6	50	10	Utiligo de la Zamenhof-Jaro kiel rimedo por ekstera informado kaj interna trejnado
37	Raleigh, US	jul	8	3	50	2	Preparo kaj redaktado de son-dokumentoj
38	Busan, KR*	jul	3	4	20	5	Intensigo de Instruista Trejnado
39	Bengaluru, IN*	okt	3	4	38	6	Evoluigo de la Esperanto-movado en la suda Azio
40	Moskvo, RU*	dec	1	6	25	3	Publikaj rilatoj kaj Esperanto: tradiciaj amaskomunikiloj, interreto
41	Parizo, FR	dec	1	8	20	--	Eksterarilata agado ĉe Unesko: spertoj kaj konsiloj por efika reprezentado
Σ12							

* Novaj landoj por AMO.

N: Numero seria. Loko: Landkodoj laŭ ISO-normoj (JL 2017, p. 267).
M: Monato.

T: Nombro da tagoj kun seminaria programo.

H/T: Nombro da horoj ĉiutage en plen-programaj tagoj.

≈ PP: Proksimuma nombro da partoprenintoj.

Gvid.: Nombro da gvidantoj: inkluzive de kunordiganto, se tiu (kun)gvidis sesion.

HEROLDO VIVAS

Heroldo de Esperanto regule aperas, plene renovigita, kun 16 koloraj paĝoj. Abonu nun la jarkolekton 2018 kaj vi ricevos, kontraŭ nur sendokostoj, ĉiujn 6 numerojn de 2017 (en unusola sendo).

► Abono por 12 paperaj numeroj + senpaga aliro al la reta versio

€ 59,00

► Abono por 12 numeroj 2018 + unusende la 6 numeroj de 2017

€ 69,00

► Abono de 12 PDF-formaj numeroj + aliro al la reta versio

€ 29,00

**Abonu ĉe www.heroldodeesperanto.com
Reta versio ĉe www.heroldodeesperanto.club**

Kontaktu nin por fariĝi distribuanto/peranto en via lando
administrejo@heroldodeesperanto.com



Baldaŭ havebla ĉe la Libroservo de UEA



Anoncetoj:

NOVA 100-STELA MONERO! Unu unco (31,1 g) da pura argento! Limigita eldonkvanto 1000. Valora donaco.
Prezo 59 €. esperanto@chello.at.

Plia verda kabaredo

■ Valentin Melnikov

Nikolao Ĥoĥlov: *Verda rido. Kabaredo.* Grafokom, Ĝurdevac, 2010, 35 p.
Prezo ĉe UEA: € 4,20

Ĉiuj literaturŝatantoj certe konas la nomon Nikolao Ĥoĥlov (ofte oni skribas lian familinomon sen supersignoj, sed laŭ la ruslingva prononco supersignoj necesas). Samaĝulo de Baghy kaj Kalocsay, arda aktivulo de Esperanto, li estis ruso kaj plejparton de la vivo vivis en Moskvo – sed la krea periodo de lia vivo, 1918-1928, pasis en Jugoslavio/Kroatio.

Kvankam li aperigis unusolan negrandan poemaron *La Tajdo* (1928), liaj poemoj poste aperis en ĉiuj gravaj antologioj kaj krestomatiaj, legeblas ankaŭ rete. Tamen ne nur brila poeto li estis. Li aktivis en la loka movado, gvidis perfektigan kurson, redaktis la gazeton *Konkordo*, tradukis tiam gravan, sed nun plene forgesitan verkon de A. Drozdov *Krucumo...* kaj ankaŭ verkis humurajn teatraĵojn por la 1-a (1923) kaj 2-a (1924) Sudslavaj Esperanto-kongresoj, eĉ mem aktoris. “La morto de la delegito de UEA”, verkita por la 2-a Sudslava kongreso, estis prezentita ankaŭ en la UK en Vieno kaj samjare aperis libroforme, en 2000 sekvis rete eldono. Tamen *Verda rido*, verkita por la 1-a Sudslava kongreso,



dum jardekoj estis konsiderata perdita, ĝis Josip Pleadin trovis ĝin en malnovaj kajeroj de *Konkordo*.

Nuntempe eĉ kleraj legantoj apenaŭ komprenus ĉiujn nuancojn kaj aludojn pri realaĵoj de 1923, speciale en Jugoslavio. Tial trionon de la libreto okupas antaŭparolo-eseo de J. Pleadin; kaj la teksto mem enhavas klarigajn piednotojn, entute 31 por 23-paĝa teatraĵo.

Inter la rolantoj troveblas Kafo Alt, t.e. Teo Jung, poste aperinta sub la sama (mal)kaŝnomo en la *Verda Biblio* de I. Lejzerowicz. (Do eble Lejzerowicz spektis aŭ legis la kabaredaĵon. Aŭ eble oni post tiu prezento vaste moknomis tiel s-ron Jung?) Aliaj nomoj de protagonistoj estas formitaj samprincipe – kvankam ĉeestas ankaŭ ĝeneraligaj figuroj kiel Konferencanto, Instruisto kaj Lingvokomitato kaj alegorioj de Esperanto-societoj.

Tamen, la kabaredo estas tro simpla kaj amatorea, havanta signifon nur en konkretaj loko kaj tempo, do vere por unufoja uzo. Apenaŭ ĝi havas literaturan valoron. Certe, talenta aŭtoro eĉ bagatelojn faras talente: jen antaŭ la publiko aperas granda cifero 6, ĝi transformiĝas al “SES”, kio ja signifas “Sudslava Esperanto-Servo”, karese nomata Sesinjo aŭ Senjo, kaj jen sur la scenejo aperas junulino kun tiu nomo, vestita tute verde (eble partoprenintoj de UK-oj antaŭ 10-15 jaroj memoras similan ulon, sed viron), kaj ŝi plendas: “Mi estas malforta virino, sola – tute s-o-o-o-o-l-a! – kaj mi devas (...) havi tiom da zorgoj pri miaj treege ofte aperantaj infanoj!” La ĉeestantoj bone komprenis, ke temas pri pluraj Esperantaj eldonaĵoj kies aperigon entreprenis SES, por nunaj legantoj tion afable klarigas piednoto. Kaj plu simile... Instruisto vigle kantas: “Lingvo Esperanto / Estas tre facila, / Kun la gramatiko / Klara kaj utila. / Nur dek ses reguloj / Tuta regularo, / Eĉ idiotuloj / Lernas ĝin sen baro...” ĉu ni ne vidis la samon en satiroj de V. Devjatnin, Cz. Kozłowski, J. Baghy kaj pluraj aliaj aŭtoroj, ĉu ne renkontis similulojn vive? Fine aperas mirakla feino, benanta kaj bondeziranta al ĉiu (ankaŭ la publiko)...

Tiajn amatorajn teatraĵetojn oni ofte faras en diversaj klubaj festoj. Eĉ la etoso fakte ne ŝanĝiĝis dum pluraj jardekoj. Do apenaŭ oni trovas ion novan en tiu libreto – kvankam certe estas interese vidi faman klasikulon de nekutima flanko...

Oficiala Informilo

DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: R. Tavares Pinheiro de Medeiros.

DONACIOJ

Ĝis la 1-a de decembro

Fondaĵo Azio

Japanio: Hitta Y. 30,30; Sibayama Z. 15,15; dum Kjuŝu-Kongreso 32,57.
Sumo ĉi-jara: 1600,11.

Volontula Fondaĵo

Nederlando: S.P. Smits 100,00.
Sumo ĉi-jara: 7245,10.

Ĝenerala kaso

Germanio: M. Hanisch 5,00.
Sumo ĉi-jara: 719,47.

**Al ĉiuj tre koran
dankon! UEA**



Pri miaj streboj enradikigi Esperanton en Rutshuru, malgraŭ teruraj malsekurecoj

■ Joel Muhire,
el Rutshuru, Kongo D.R.

Estas memevidente, ke Afriko paŝas progresen en la Esperanto-movado; por mi estas dubinde, ĉu ekzistas afrika lando sen esperantistoj! Ĉu tamen estas denaskaj esperantistoj en Afriko aŭ homoj, kies ĉiutaga lingvo estas Esperanto? Ĉiuj respondoj estas: kompreneble, jes! Sed ne multaj, mia opinio! Eble estas nur manpleno da tiaj homoj kaj familioj, en kiuj Esperanto estas ĉiutaga praktikaĵo; pri tio ĉi mi povas doni ekzemplon de Esperanto-familio, kiun mi konas: tiun de Hubert, kies edzino kaj gefiloj ĉeestas kurson en *Solidareco Bona Volo* (SBV-Rutoboko) en la urbo Goma! Esperanton, iom malpli konatan aŭ preteratentatan lingvon, granda parto el la esperantistoj lernis hazarde, mi mem esperantistiĝis hazarde en 2008 post mia unuafoja kontakto kun Honoré Sebuĥoro! Fakte la relativa mirindeco de Esperanto, ĝiaj boncelaj idealoj kaj fleksebloj igas, ke multaj homoj interesiĝas pri ĝi kaj, el-lerninte ĝin, tiuj tuj fariĝas mirindaj homoj kun impulsa bonvolo diskonigi Esperanton al la ekstera publiko, jen kiel ekzistas lokaj Esperanto-kluboj, naciaj asocioj ks.

Mi, kiel celkonscia diligenta esperantisto, ĉiam zorgas, ke nian lingvon multaj Rutshuru-anoj agnosku kiel vi-

vantan, parolatan, ĉiel uzindan lingvon malgraŭ ĝia kreiteco. La unua paŝo, kiun mi sukcesis fari, estas dissendi kurson tra radioj. Mi unuafoje en 2012 disaŭdigis duonhoran Esperanto-kurson en la radio *RACOU FM* (Radio Communautaire Ushirika), bedaŭrinde, pro ribelaj akraj puĉatakoj far M23* tiujare en tiu landparto de DR Kongo, la dissendo ĉesis okazi post du monatoj, ĉar mi devis fuĝi translimen en Ugandon. Reveninte hejmlanden en 2014, mi cerbumis kiel denovigi la Esperanto-instruadon en Kiwanja; mi ekplanis viziti kune kun s-ro Honoré Sebuĥoro la reverendon Ngango Muhima por peti permeson ekinstrui Esperanton en lia privata orfejo Njiwa; ni klarigis, kio estas Esperanto kaj kial indas ĝin lerni; bonŝance, li favoris nian petdeziron. De tiam la Esperanto-kurso okazas ĉiun vendredon en tiu orfa lernejo, kaj kelkaj lernantoj jam nun kapablas sin esprimi en Esperanto. Apartan dankon mi ŝuldas al s-ro Ronald Glossop el Usono, kiu malavare pli ol unu fojon sendis al nia lernejo Njiwa legolibretojn, paŝtojn ktp., ĉiuj lernantoj fakte ĝojis tiugeste, ke ilia lernejo estas konata eĉ de eksterlandanoj! Mi reiniciatis samjare en 2014 ankaŭ instruadon de Esperanto tra la radio *Alliance FM*, konsentitan de ĝia estro John Koraho. Multaj sen ia scio pri la ekzisto de Esperanto tiam opiniadis, ke estas la hispana, sed iom

post iom ĉiuj komencis kompreni, ke temas pri sennacia kreita vivanta lingvo celanta forigi la lingvajn barojn inter la homoj. Bedaŭrinde en oktobro 2016 la Esperanto-antenspaco estis nuligita pro nova programo de la radio. Intertempe komencis funkcii nova radio nome: *RACOVE FM* (Radio Communautaire la Vérité), mi planis viziti ĝian estron s-ro Faustin Tawite en februaro 2017 por peti antenspacon por Esperanto en tiu radio; bonŝance ankaŭ tiu senhezite konsentis! Kia ŝanco por Esperanto en Rutshuru! Mia elsendo okazas ĉiun lundon posttagmeze, multaj aŭskultantoj elmontras interesiĝon lerni kaj aliaj skribas ĉion, kion ilin aŭskultas!

Krome, *RTDH FM* bonvenigis Esperanton antaŭnelonge. S-ro Innocent Makuza, ĵurnalisto en tiu radio kaj unu el miaj lernantoj, sukcesis persvadi sian estron pri la neceso instrui Esperanton tra ĝi; la kontribuo elsendiĝas unu horon ĉiutage. Notindas ankaŭ, ke s-ro Bibero, ĵurnalisto de la radio *RACOU FM*, en siaj ĉiutagaj elsendoj pri lokaj muzikistoj, mielvorte komentas pri Esperanto ĉar, pro mia unua albumo: *Esperanto ilo de paco*, mi ne estas ekster konsidero.

Esperanto nuntempe estas vaste konata en Rutshuru danke al tiuj radiostacioj supre menciitaj, ĝi plie hejmas en tri institucioj: Elementa lernejo Njiwa (de Joel Muhire), Instituto Bethanie (de Honoré Sebuĥoro) kaj Instituto Kasasa (de Prime Nsabimana).

* M23 – Ribela Movado de la 23-a de Marto.



Novaj sukcesoj de Esperanto ĉe Unesko

Gravaj kaj sukcesaj rezolucioj de Unesko, favore al Esperanto

Rezolucio de 1954 (Montevideo)

Rezolucio de 1985 (Sofio)

Rezolucio de 20.. (?)

Unuiĝintaj Nacioj por edukado, scienco kaj kulturo (Unesko) estas grava organizo, fondita en 1945 kun la ĉefa sidejo en Parizo kaj aldonaj oficejoj en dekoj da landoj, havanta 195 ŝtatojn, kiel membrojn kaj 6 observantajn. Ĝi aj celoj ofte kongruas kun tiuj de la Esperanto-Movado kaj Esperanto-organizoj. La Esperanto-Movado havas longan historion de kunlaboro kun Unesko. Universala Esperanto-Asocio estas en oficialaj rilatoj kun Unesko (ekde 1954) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj havas la statuson de observanto de la organizo. En 2012, laŭ la decido de la tiama Ĝenerala Direktoro de Unesko s-ino Irina Bokova, UEA fariĝis konsulta partnero de Unesko, konforme al la novaj gvidlinioj pri la rilatoj de Unesko kun Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO-j). Tiu

okazaĵo levis la interagon de UEA kaj Unesko al pli alta ŝtupo, kiu permesas ne nur la formalajn rilatojn, sed ankaŭ realan kunlaboron inter la organizoj.

Multaj UK-oj ricevis mesaĝojn de la Ĝenerala Direktoro de Unesko. UEA partoprenis en la diversaj kampanjoj de Unesko. Tiu vojo de kunlaborado inter UEA kaj Unesko estas tre longa kaj fruktodona. Indas rimarki, ke du gravaj rezolucioj de Unesko favoraj al Esperanto (de Montevideo en 1954 kaj de Sofio en 1985) montras seriozan trakton de Esperanto, kadre de tiu ĉi organizo. La unua rezolucio konsistis el la principa rekono de Esperanto kaj konfirmo, ke la celoj de la neŭtrala internacia lingvo kongruas kun la celoj de Unesko. La dua konfirmis la deklarojn de la unua kaj grave subtenis festadon de la 100-jariĝo de Esperanto, kiu bunte kaj amase okazis poste en 1987. Eblas konstati, ke tiam kelkaj Unesko-ŝtatoj serioze traktis tiun ĉi rezolucion kaj vere apogis Esperanton: aperadis multaj informoj pri Esperanto en diversaj lokoj, ŝtatoj eldonadis per centmilaj kaj eĉ milionaj eldonkvantoj kovertojn kaj poŝtmarkojn kun Zamenhof, Esperanto kaj gravaj esperantistoj. Tio ankaŭ havis influon al tio, ke en 1987 okazis la plej amasa Uni-

la tiama situacio en la orienteŭropaj landoj, sed tamen aktive partoprenis ĝin neoficiale. Inter tiuj rezolucioj pasis 31 jaroj. Kaj nun ekde la lasta pasis jam 32 jaroj. Ĉu eble venis tempo por la sekva, tria grava rezolucio de Unesko pri Esperanto? Grava laboro estas antaŭ ni kaj provo ne ripeti la antaŭajn erarojn, kiel ekzemple rezolucio de 1993, kiu ne estis traktata pro tio, ke ĝi portis nenion principe novan en la teksto.

Nuntempe videblas granda progreso kaj aktiviĝo ĉi-rilate: esperantistoj partoprenas la aranĝojn de Unesko, okazas diversnivela kunlaboro, ekde 2017 UEA eldonas la *Unesko-Kurieron* en Esperanto, kiu ne restis nerimarkita de la gravuloj ĉe Unesko. Novembre de 2017 reprezentanto de UEA alparolis la Ĝeneralan Konferencon de Unesko, decembre de 2017 estis organizita la solena evento rilate al la fino de la Zamenhof-Jaro, en la pariza sidejo de Unesko, kun la temo *Tutmondiĝo, Interreto, Unesko-Kuriero: kiel statas Esperanto, cent jarojn post la morto de Zamenhof?*

Estas grandaj planoj daŭrigi tiun ĉi agadon. Inter la plej gravaj direktoj la aktivuloj traktas la daŭrigon de la eldonado de la *Unesko-kuriero* en Esperanto (por pliaj detaloj legu artikolon de Trezoro Huang Yinbao ĉi-numere), laboro rilate la rezoluciojn, traktado de la eblo, ke Esperanto iĝu la 7-a oficiala labora lingvo de Unesko, propono fari Esperanton nemateria monda heredaĵo. Nun aperis la espero, ke tiaj celoj estas pli realismaj, ol oni povis supozi antaŭe. En la pasinta jaro 2017 ni vidis multe da entuziasmo pri tio. Maturaj fruktoj de tiu ĉi agado aperos nur, se pluraj esperantistoj, specialistoj en tute diversaj kampoj, multe kunlaboros por realigi tiujn ĉi projektojn.



Kovert kun poŝtmarko, omaĝe al la 100-jariĝo de Esperanto. Poŝto de USSR, 1987.

La redakcio de la revuo *Esperanto* parolis kun la aktivulo Rakoen Maertens, kiu la 6-an de novembro en Parizo alparolis la 39-an Ĝeneralan Konferencon de Unesko, nome de UEA kaj TEJO.

Revuo Esperanto: *Kiam kaj kial aperis ĉe vi la ideo partopreni en la ĉi-jara Ĝenerala Konferenco de Unesko?*

R. M.: Dum la lastaj du jaroj mia fokuso en miaj projektoj estis ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj rilataj instancoj. En Belgio, mi estas estrarano pri eksteraj rilatoj de la junulara sekcio de UN-Asocio Flandrio Belgio. Mi ankaŭ estas kunfondinto kaj gvidanto de *Genta Modelo de Unuiĝintaj Nacioj* (GhentMUN). Cetere mi partoprenis en pluraj eventoj rilate al UN en pluraj landoj, kiel interesato aŭ kun belga delegacio de junuloj. En Esperantujo, mi jam kelkajn jarojn volontulas pri eksteraj rilatoj de TEJO kaj UEA. En majo 2017 okazis la *Unesko-NRO-Forumo* en Sauda Arabio. Mi estis invitita por partopreni kiel reprezentanto de UEA kaj TEJO. Tie, en la aranĝo, mi estis tiom impresita pri niaj seriozaj rilatoj kun tiaj altnivelaj organizoj, ke mi tuj decidis fari plian agadon en UEA kaj TEJO. Mi komencis vere sekvi la movadon, kaj en aŭgusto iĝis Komitatano Ĉ kaj Komisiito pri Unesko de TEJO. Ekde tiam mi profunde sekvas Uneskon. Kiam mi vidis, ke okazos Ĝenerala Konferenco de Unesko, mi ricevis la proponon partopreni, kaj mi tuj akceptis.

Revuo Esperanto: *Kiom da kaj kiuj UEA-reprezentantoj partoprenis la konferencon?*

R. M.: Nome de UEA oficiale partoprenis ses personoj: François Lo Jacomo, Renée Triolle, Didier Loison, Barbara Despiney, Gilles Tabard kaj mi. Ni ĝenerale estis multnombro kompare kun aliaj NRO-j, kiuj plej ofte venis kun malpli ol 5 homoj. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de ILEI, nome Monique Arnaud, Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire, Marie-Sylvie Julian kaj Emmanuel Desbrières. Aldone ankaŭ ĉeestis Estelle Maria Loiseau, la esperantistino, kiu nun laboras en Unesko mem.

Revuo Esperanto: *Pri kio vi kaj la aliaj esperantistoj okupiĝis dum la konferenco?*

R. M.: La Ĝenerala Konferenco estas grandega, kun plena programo. Vi povas ĉiam plenigi vian tempon simple partoprenante en la normalaj aranĝoj, kelkaj ĉefe faris tion. Ĝi montras, ke ni aktivigas kaj interesigas pri pluraj aferoj. Kvankam ankaŭ tio gravas, se vi nur farus tion, vi maltrafis la kernan agadon. Ĉirkaŭ vi estas homoj el ĉiuj landoj. Ambasadoroj kaj ministroj, altaj homoj el UN kaj Unesko kaj prezidantoj de NRO-j. Vi devas mem vidi kaj krei la ŝancojn. Krom ĝenerala partopreno kaj rekontaktado de jam konataj partneroj, ni havis kelkajn pli fortajn agadkampojn. Ni esploris kiel novaj Esperanto-organizoj kiel (sed ne nur) TEJO povus pli facile iĝi partnero



© UNESCO/C.ALIX

de Unesko, kaj kiel ILEI povus reakiri partnerecon. Ni ankaŭ serĉis kaj konvinkis gravajn homojn por veni al la evento pri la Zamenhof-Jaro la 11-an de decembro en la konstruaĵo de Unesko (<https://esperanto-france.org/annee-zamenhof>). Krome ni esploris kiel antaŭenigi la laboron pri Esperanto kiel nemateria mondheredaĵo, kunlabore kun la pola delegacio. Mi mem stariĝis novajn kontaktgrupojn kun junaj delegitoj, junaj Unesko-uloj kaj junaj NRO-reprezentantoj, kiuj pretus aŭ kunlabori kun UEA kaj TEJO, aŭ fari ion pri lingvojusteco kaj lingvodiverseco. Mi sukcesis kunigi junularajn delegitojn de pluraj landoj,





Delegacio de UEA dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo, novembro 2017

kaj kunorganizi kelkajn malgrandajn junularajn kunvenojn dum la Konferenco. Dume mi provis pligrandigi la kunlaboron kun la Unesko-NRO-Liga Komitato. Kun kelkaj el la novaj partneroj mi jam planis daŭrigi la konversacion dum la NRO-Forumo en decembro 2017 (<https://en.unesco.org/events/climate-change-and-ngos-eight-international-forum-ngos-official-partnership-unesco>). Kaj neforgeseble, ni ankaŭ kune pretiĝis por la oficiala parolado al la asembleo. Sed eble la plej

grava, kion mi mem faris, kion la aliaj ne faris: partoprenon en la vesperaj kaj noktaj programoj ĝis noktomeze. Mi ĉiam restis por la vesperaj kulturaj manĝo-trinko-festoj kaj la postaj kunvenoj. Dum tiuj eventoj oni faras tre gravajn kontaktojn, kaj fortajn ligojn forĝas. Ekzemple kun la rusa diplomato, mi dum la ĉina vespero faris kvazaŭ drink-konkurson. Li diris al mi, ke iu fortega ĉina alkoholaĵo estas kiel akvo por li. Mi montris, ke mi konsentas. Poste dum la tuta kon-

ferenco li salutis min amikece. Tio estis nur ekzemplo, sed pluraj el miaj plej bonaj kontaktoj dum la seriozaj kunvenoj kaj diskutoj estis tiuj, kiujn mi renkontis dum tiaj vesperaj eventoj.

Revuo Esperanto: *Rakontu iom pri via Unesko-kaj UN-agado, rilata al Esperanto, ekster la konferenco.*

R. M.: Mi rakontis kiel mi atingis tiun ĉi pozicion. Kion mi nun faras kaj volas fari en la estonteco, tio estas pli ambicia. Post la Konferenco mi vidis la gravecon kaj la ŝancojn, kiujn ni havas, sed ankoraŭ ne maksimume uzas. Mi havis konversaciojn kun altniveluloj de Unesko pri Esperanto, kie ni per argumentado venis al konkludo, ke Esperanto vere povus funkcii kiel la 7-a lingvo de Unesko. Mi antaŭ tiu momento mem ne kredis je tiu opcio, sed nun la aferoj ŝanĝiĝis. La NRO-forumo en Sauda Arabio ŝanĝis mian propran vidpunkton pri Esperanto, kaj pligrandigis mian agadon. Tio denove okazis en tiu ĉi Konferenco, sed eĉ pli forte. Mi nun pli ol antaŭe volas pligrandigi la kunlaboron kun la partneroj en Unesko, kun la Liga Komitato kaj kun Unesko mem. Por tio mi mem planas investi pli da energio en tiu agado, sed ankaŭ bezonatas



Unesko-kuriero en Esperanto sukcesas

■ Trezoro Huang Yinbao

Dum mia tuta vivo, la plej honora posteno estas fariĝi la ĉefredaktoro kaj la kunordiganto de la *Unesko-Kuriero* en Esperanto, la plej emocia momento estas proprokule spekti la belajn konstruaĵojn de la Unesko-sidejo, kaj la plej granda feliĉo estas prelegi sur la podio de la belega 11-a salono de Unesko la 11-an de decembro 2017.

La *Unesko-Kuriero* estas la oficiala revuo de Unesko. Ĝi ekaperis en 1948. Kiel grava komunikilo por disvastigi la misiojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de Unesko en la kampoj, pri kiuj ĝi respondecas. Ĝi estis eldonata en la 6 UN-lingvoj.

En 2012, la revuo bedaŭrinde devige ĉesigis la eldonadon pro manko de financaj rimedoj, pro tio ke Usono ĉesis pagi la membran kotizon. En septembro ĝis oktobro 2016, mi feliĉe estis invitita de la tiama Ĝenerala Direktoro Veronika Poór, por volontule labori du monatojn en la CO de UEA. Laborante en la koro de Esperantujo, mi ofte pensis kiamaniere apliki la uzadon de Esperanto. Mi faris kelkajn proponojn al UEA, ekzemple, kunlabori kun Ĉina Konfucea Instituto, Ĉina Radio Internacia kaj Esperanto-Muzeo en Ĉinio ktp. La 17-an de oktobro 2016, mi legis novaĵon ĉe la retejo de Unesko ke la ĉina registaro decidis donaci 5,6 milionojn da usonaj dolaroj por financi la rekomencon de la eldonado de la *Unesko-Kuriero*. La novaĵo tuj atentigis min pensi pri la eldono de *Unesko-Kuriero*. Mi decidis komenci la eldonon nome de Esperanto-Centro *Ora Ponto* en Ĉinio, unue per mia propra mono. Tamen, post esplorado kaj konsultado, mi konsciis ke laŭ ĉina regularo, *Ora Ponto* ne rajtas eldoni periodaĵojn. Tiel ni decidis, ke UEA eldonu ĝin, kaj mi komisiita de UEA, plenumu la taskon nome de UEA.

La 12-an de majo de 2017, Unesko publikigis la unuan numeron de la

Kuriero (la aprilo-junio) en la 6 UN-lingvoj kaj poste ankaŭ en la portugala lingvo. Mi tuj komencis la laboron helpe de kelkaj bonkoraj kunlaborantoj. Post la alvoko en Gazetaraj Komunikoj de UEA 36 esperantistoj el 23 landoj el kvin kontinentoj aliĝis al la kunlabora teamo. Fakte Renato Corsetti jam antaŭ la publikigo en la UN-lingvaj versioj serĉadis tradukistojn. Kaptante la ŝancon mi deziras diri al ĉiuj kunlaborantoj koran dankon! Nun ni trovis bonan vicredaktoron Andrej Peĉonkin el Rusio.

Laŭ mia peto, Unesko aldonis Esperanton al la listo de la eldonaj lingvoj, alŝutis la Esperanto-version en la retejon de Unesko. Ĉiuj legantoj de la *Kuriero* en la 6 UN-lingvoj kaj la portugala lingvo, scias, ke ekzistas la internacia lingvo Esperanto, scias ke ankaŭ la *Unesko-Kuriero* estas eldonata en Esperanto. Se vi malfermas la retpaĝon de la *Kuriero* ĉe la Unesko-retejo, vi rimarkos ke en teksto de la rubriko "*Pri la Kuriero*", oni menciis ankaŭ Esperanton.

Ege gravas, ke la *Kuriero* en la UN-lingvoj estas legata de altnivelaj ŝtataj gvidantoj de Unesko-membraĵoj kaj diplomatoj. La *Kuriero* fariĝas grava ilo por informi homojn pri la utileco kaj la valoro de Esperanto. La 13-an de majo, en la publika ceremonio de la ĉinlingva versio, Irina Bokova, la tiama Ĝenerala Direktoro de Unesko, deklaris, ke Unesko donacos la *Kurieron* al ĉiuj fremdlandaj ambasadoroj en Ĉinio kaj Unesko-organizoj en Ĉinio.

Antaŭ dek jaroj, la tiama ĉina prezidanto s-ro Hu Jintao foje diris ke oni ne nur devas bone paroli la mandarenan lingvon, sed devas lerni ankaŭ "mondan lingvon". Post la parolado, ni ĉinaj esperantistoj varme diskutis, ĉu temas pri Esperanto? Ĉar en la ĉina lingvo Esperanto estas tradukata, kiel *monda lingvo*. Iuj supozis ke li parolis pri Esperanto, kaj aliaj diris ke li tute ne scias pri la ekzisto de Esperanto. Kaj hodiaŭ, se la nuna prezidanto parolus pri la monda lingvo, ĉiuj sciis ke temas pri Esperanto. Ĉar Esperanto estas lis-



tigita ankaŭ en la ĉinlingva versio de la *Kuriero*, kies ĉinlingvan version li povas legi.

Kiam mi iniciatis la projekton eldoni la *Unesko-Kurieron* en Esperanto, mi planis realigi sekvajn celojn ene de 3-4 jaroj: 1. En la 1-a jaro, ni eldonu la *Esperantan version*, por helpi Uneskon; 2. En la 2-a jaro, ni petu Uneskon menciigi la eldonon de la *Esperanta versio* en ĉiuj lingvaj versioj, por informi la legantojn pri la ekzisto de Esperanto; 3. En la 3-a jaro, ni petu Uneskon akcepti kaj alŝuti la *Esperantan version* al la Unesko-retejo, por informi la publikon pri Esperanto; 4. En la 4-a jaro, ni petu Uneskon esperantigi la retpaĝon de la *Kuriero*, por informi la publikon pri Esperanto. Mi ne antaŭvidis ke ni tiom rapide kaj facile realigos tri celojn ene de nur duonjaro. Dum la komunikado kun Unesko-funkciuloj, mi sentas ke ili tre afable subtenas Esperanton. Mi jam antaŭvidas ke Unesko certe konsentos esperantigi la retpaĝon de la *Unesko-Kuriero*, se ni petos.

Tamen ekzistas ankaŭ problemoj. Ni havas bonkorajn tradukistojn kaj provlegantojn, ili estas senpagaj volontuloj. La dua problemo estas financo. Por havi permeson eldoni ĝin, mi promesis al Unesko kaj UEA ke mi mem pagos la eldonadon. Mi povos daŭrigi la eldonon sen ekstera subvencio. Tamen finfine la eldonado povos ĉesi pro la financa problemo, se ni ne povos trovi novan rimedon.

La *Unesko-Kuriero* en Esperanto fakte apartenas al ni ĉiuj. Mi petegas moralan kaj financon subtenon de ĉiuj esperantistoj.

103-a Universala Kongreso de Esperanto, 28 julio–4 aŭgusto 2018 Lisbono, Portugalio

■ Clay Magalhães

La preparoj de la UK iras tre aktive. La kongreso okazos en tri mal-samaj konstruaĵoj. En la Rektorejo de la Universitato de Lisbono okazos la komitataj kunsidoj, vesperaj artaj aranĝoj kaj Solena Fermo. En la Fakultato pri Juro de la Universitato de Lisbono estos la ĝicetoj, budoj, Libroservo, okazos diversaj kunsidoj. Ambaŭ konstruaĵoj troviĝas ĉe Alameda da Universidade, Cidade Universitária, Lisboa (metrohaltejo Cidade Universitária). Ĉe Coliseu dos Recreios okazos la Solena Inaŭguro kaj Nacia Vespero. Ĝi estas unu el la plej antikvaj partoj de la urbo.

La oferto de la loĝado estos tre varia kaj inkluzivos hotelojn 5-, 4- kaj 3-stelajn, junulargastejojn kaj amasloĝejon ĉe lernejo. La hotelo plej proksima de la universitato troviĝas je 800 metroj, laŭ la ebena vojo. Aliaj hoteloj kaj junulargastejoj troviĝas je piedira distanco aŭ/kaj estas facile atingeblaj pere de publika transporto. La hotelo plej kosta, kaj la plej proksima de la universitato, proponas unulitan ĉambron por 144 eŭroj/tage, dulitan ĉam-

bron por 78 eŭroj/tage p.p. Ĉambrojn en 5-stela hotelo eblos mendi por 127 eŭroj/tage por unu persono kaj 70 eŭroj/tage p.p. en dulita ĉambro. Ĉambrojn en 3-stela hotelo eblos mendi ekde 78 eŭroj/tage por unu persono kaj 43 eŭroj/tage p.p. en dulitaj ĉambroj. Litoj en junulargastejoj kostos ekde 17,50 eŭroj/tage (kun matenmanĝo). Baldaŭ aperos ankaŭ la prezoj por la amasloĝejo.

La oferto de la ekskursi programo estos ege riĉa. Portugalio estas tre alloga lando por turismi. La organizantoj negocadas, por ke la prezoj kaj itineroj estu la plej avantaĝaj por la kongresanoj.

La bankedo kaj balo okazos en la kvartalo Belém, en moderna konstruaĵo kun la vido al la rivero.

Sekvu la informojn pri ĉiuj ofertoj en la oficiala retejo de UEA <http://uea.org>.

La Loka Kongresa Komitato havas 15 membrojn, el kiuj la prezidanto estas José Martins, la sekretario kaj kongresejestro estas Antonio Martins, Eks-teraj Rilatoj Miguel Faria de Bastos, la

kasisto estas Vitor Marques, Bankedo kaj Balo Wilson Brigído, Junularo Marta Martins.

Por profiti la bonan kongresan kotizon, ni sugestas al tiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis, fari tion laŭeble pli frue (vidu la aliĝperiodojn en la retejo de UEA). La vojaĝoj, ĉu buse, trajne aŭ aviadile ĝis Lisbono estas pli malmultekostaj, se oni aĉetas la bileton kelkajn monatojn antaŭ la vojaĝo. Se oni havas tempon kaj deziron vidi iom de la portugala pejzaĝo antaŭ/post la kongreso, povas esti, ke la flugoj al/el Porto (norde de Lisbono) aŭ Faro (sude de Lisbono) havos malpli altajn prezojn. El tiuj urboj eblas trajni kaj busi ĝis Lisbono dum ĉirkaŭ 3-hora vojaĝo.

El la alvoko al artistoj rezultis granda sukceso kaj ni atendas la limdaton por povi fari la malfacilan taskon – decidi kiuj estos akceptitaj por prezenti sian artaĵon al la publiko de la UK en Lisbono.

Malkovru Lisbonon ankaŭ vi!



Pri ~~homoj~~ insektoj, lumo kaj krizalido

Recenzo por la spektaklo *El la vivo de insektoj* de la ensemblo DOMA (DOcela MALé) de Svitavy, montrita la 25-an de julio dum la UK en Seulo. Aŭtoroj: Karel kaj Josef Čapek; sceneja adapto: Radmila Oblouková; tradukisto: Miroslav Malovec; reĝisoro: Radmila Oblouková

■ Anna Striganova

Kiam post la spektaklo mi forlasis la salonon, min kovris granda hela maltrankvilo, kiu vokis min iomete paroli kun iu. Mi serĉis iun ridetantan inter la homoj, same ridetantan, kiel mi. Sed la plejparto de la kongresanoj ŝajnis tro pensemaj. Unu el la spektintoj kaptitaj de mi diris, ke li ne ĉion komprenis, dua, ke la spektaklo estis tro trista. Tion ja mi rakontas al vi por eviti eĉ etan mensogon. La spektaklo plaĉis al mi, sed certe ja mi ne promesas, ke, vere trista kaj iom netradicia, ĝi plaĉos al ĉiuj. Finfine, mi trovis ĝuste tiun rideton, kiun mi serĉis. Estis tiu de nia kara korektisto Rob. Li ridetis same kiel mi, kaj ni iomete parolis pri la spektaklo – al li tre plaĉis, kiel estis transdonitaj diversaj homaj karakteroj.



Jes, ĝuste ili, homaj karakteroj. Vi ne devas esti tro atenta spektanto por tuj kompreni, ke la mondo de insektoj – estas la homa mondo. Ĉiutage ni renkontas ilin ĉiujn: belegajn muŝetojn vantajn kaj kruelajn en sia naiva stulteco; skarabojn, kiuj opinias ke la senco de la vivo estas zorgema farado de grandaj, komfortaj – ĉiujn en ĉiujn – globetoj el koto; formikojn, kiuj fanatike, arde kaj senpense militmarŝas nesciate ki-

en por je nesciate kio fordoni sian vivon je la nomo de la lando, estro, dio (elektu la pli aktualan vorton). Jes, ĉiuj tiuj karakteroj estas bele transdonitaj. Unue ni, spektantoj, gaje ridas, poste ridas jam ne tiom gaje. Do, kiel mi jam diris, karaj spektantoj ne devas esti tro atentaj por kompreni, pri kia-specaj homoj kaj kiaspecaj homaj ecoj kaj trajtoj rakontas ĉiu peceto de la spektaklo. Ili, se diri iom alegorie, estas pentritaj per granda peniko, per brila farbo, kaj tio faras la spektaklon iomete fabla.

Trans tiu insekta mondo de uloj, kies malbonaj stultaj trajtoj estas pli grandigitaj, nudigitaj, superversitaj per brila taga lumo kaj en sia plena ridindeco kaj malestimindeco montritaj al ni, vagadas la ĉefa heroo.

Tiu rolo kaj rolanto ĝia, laŭ mi, estis plenumitaj perfekte. Mi neniam komprenis, kion ĝuste devas fari aktoro por ke post kvin minutoj de spektaklo ĉiu homo en la salono facile kaj klare komprenu: “tiu ulo – estas mi”. Mi ne scias, kiu pli sukcesis, ĉu la aktoro, aŭ la reĝisoro. Sed, jes, heroo estis mi, vagabondo perdita en la mondo, kiu serĉas almenaŭ iun veron en la bunta, vanta, vulgara kaj kruela mondo de... jes, certe de insektoj.

Ĉi tie mi devas diri, ke ĝis tiu momento mi intence ne legis la originalan verkon de K. kaj J. Čapek, sur kiu baziĝas la spektaklo. Leginte mi nepre komencus kompari ĝin kun la spektaklo kaj tio malpurigus mian impreson, sed mi ja devas transdoni ĝin al vi laŭeble pli pura. Sed mi kaŝrigardis la finon, kaj ŝajnas al mi, ke sinjoroj Čapek ne donacis al sia



heroo feliĉan finon de la historio. Kaj en la spektaklo ĝi ja estas. Miaj karaj spektantoj, ne ofendiĝu al mi poste, se vi rigardos tiun spektaklon kaj la fino ne ŝajnos al vi feliĉa. Sed ĝis nun, post duonjaro, unu frazo de la spektaklo, tre kurta: “Vi estas bela, krizalido” sonas por mi kvazaŭ iu aparta bona kanto, kiu donas helan, fortan kredon en la vivo, en la senco de ĉiu stranga soleca vojo. Tiel ĝi estis prononcita, tia sento sonis en la voĉo de la ĉefa heroo, ke tuj kaj por longa tempo, eble por ĉiam loĝiĝis en la koro varma kompreno, ke “vi estas bela, krizalido” – estas... estas tute taŭga senco de l’viv’.



Restis diri nur kelkajn vortojn pri la dekoracioj. Mi, verŝajne, neniun mirigos, se mi diros, ke en moderna teatro dekoracioj kaj kostumoj povas tute manki. Ĉi tie ili tamen estis, ne multaj, sed tre-tre utilaj. Ekzemple, unu ordinara globeto helpis al bela muŝeto montri sian gracion kaj al skarabo – sian mizeran avidecon. Ankaŭ la kostumoj estis skemecaj kaj substrekis la karakterojn de siaj portantoj – buntaj flugantaj jupoj de vantaj muŝetoj, kapuĉo duonkovranta la vizaĝon de fanatika tirano-formikestro. Sed ĝuste en la dekoracia parto kaŝis sin du solaj malhelaj makuloj, kiujn mi sukcesis trovi en la spektaklo. Unue, iu granda kolonsimila griza aĵo, kun kiu la heroo parolas de la komenco de la spektaklo, restas nekomprenebla preskaŭ ĝis la fino. Povas esti, ke komence la heroo tamen nomis ĝin krizalido kaj mi misaŭdis tion. Sed mi sidis proksime kaj atente aŭskultis. Se mi ne kaptis – do verŝajne ne kaptis la plejparto. Tio, certe, ne estas tro grava, sed se dekomence mi scius, ke tiu aĵo estas krizalido, mia koro dolĉe tremetus ĉiun fojon, kiam la heroo (kiu, mi memorigas, estas mi)



proksimiĝis al ĝi kaj parolis kun ĝi. Ĉar certe ĉiu homo, kiu almenaŭ foje vidis krizalidon, klare komprenas, ke ĝi estas pura, tenera, malfirma miraklo. Kaj la koro de la spektaklo. Do estus bone, se tiu estus senteblo de la komenco. Dua makulo estas kandeleteto. Ĝia dimensio. Mi sidis apud la scenejo por foti, pli proksime sidis neniuj, kaj la kandeleteto estis tiom malgranda, ke mi apenaŭ vidis ĝin. Mi dubas, ke la malantaŭa parto de la salono ĝin vidis, sed kiom grava estis ĝia eta rufa lumo inter la fingroj de la heroo! Kaj interalie ĝuste ĝi, ĝuste tiu momento estas la kulmino. Mi (pardonu, la heroo,

sed ne mi) trovis neniun lumon en la mondo, do mi bruligas la mian! Etan flameton de eta kandelito. Se mi nenion vidas en la mondo, verŝajne malhelpas manko de lumo, de mia lumo, tiu, kiun nur mi kapablas ekbruligi. Kaj, evidentiĝas, ke tiu lumeto tute sufiĉas por... tion mi ne povas malkovri al vi, ĉar devas resti enigmo por ke vi mem rigardu la spektaklon.

Venas fino – strange, ebrie felika kaj amare trista samtempe, ĉio finiĝis, sed ĉio estis. Kaj iom perdita heroo prononcas malrapide enirante la mallumon: “Mi tuŝis la belecon”.

Reciproke.

ILEI

Nova situacio, nova laboro por ILEI

■ Mireille Grosjean

Venas petoj el diversaj landoj: ni bezonas Esperanto-instruistojn. Konsekvence ILEI agadas kaj starigas novajn programojn.

Vi jam povis legi pri du programoj kun la nomo EIT (Esperanto-Instruista Trejnado). Ili postulas studadon per la reto ĉe edukado.net dum plena jaro kaj partoprenon en ĉeesta parto. Unu eblo fizike partopreni okazos dum la ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio, en julio 2018. Nun jam aliĝis 8 personoj al tiu kurso. La alia EIT okazos dum la du semajnoj de Interlingvistikaj Studoj en Poznań, Pollando, komence de februaro kaj fine de septembro 2018. Ĉiuj detaloj troviĝas ĉe ilei.info.

Rilate tiun anoncon en Facebook pri la kurso en Poznań, okazis la sekva dialogo kun afrika kolego:

Augustin Kakoza: Kiel afrikanoj profitos ankaŭ?

Mireille Grosjean: Jen ni devas pripensi kiel solvi la ĉeestan parton. Solvo aperas en Afriko; bonvole havu paciencon, baldaŭ aŭdiĝos la detaloj!

Tiu frazo tiklis min, tuj mi devis ekpripensi kaj mi trovis la solvon: ILEI starigu trian tian lertigadon kun fina ĉeesta semajno en Kotonuo, Benino, de la 4-a ĝis la 11-a de novembro. Afrikanoj povas aŭ atingi Beninon sen vizo aŭ facile akiri vizon. Do eblos por ili atingi Kotonuon. La surloka organizado estos en la manoj de la NRO «Scio Sen Bariloj», tute same kiel la sukcesa kvina Afrika Kongreso de Esperanto fine de 2013. Jam alvenis informpetoj el Ganao, Benino kaj DR Kongo. Pliaj beninanoj estas atendataj. Pro la forta movado en Togolando ni povas esperi, ke najbaraj togolandanoj venos grupe. Kaj jam ni atingos la maksimuman kvanton da partoprenantoj: 20. Samtempe okazos

lingvaj ekzamenoj de ILEI/UEA «tria nivelo».

Nun ni devas alfronti la problemojn de la kostoj, sciante, ke malmultaj afrikanoj povos mem pagi la kurson, la vojaĝon al Kotonuo kaj la restadon en la kulturcentro JoCa. Pro tio ni nun lanĉas kampanjon por kolekti monon. Partoprenontoj kaj malavaruloj rigardu la detalan priskribon en ilei.info, ĉefpaĝo ĉe novaĵoj.

Ni jam nun elkore dankas al tiuj, kiuj ebligis tiun valoran lertigadon en Kotonuo, kiun mi mem gvidos en novembro.

Resume: dum 2018 ni povos diplomigi 24 personojn en Madrido, 24 personojn en Poznań kaj 20 en Kotonuo, entute 68. Se homoj ne aliĝos, tio signifos, ke ne plu temas pri Esperanto-«Movado», sed Esperanto-«Stagnado». Ĉu tio estas la realeco?



SCIO SEN BARILOJ

Antaŭ dek jaroj mortis Claude Piron

■ Mireille Grosjean
(kompilanto)

La 22-an de januaro 2008 Claude Piron mortis nature, falante en sia loĝejo tute subite, sen iu antaŭa malsano aŭ simptomo. Jen la parolado de Mirejo Grosjean dum la funebra ceremonio honore al Claude Piron. Tiu parolado okazis en la franca lingvo. Ĉi tio estas la traduko:

*Gland, Svislando, la 25-an de januaro 2008
Altestimataj gesinoroj,*

Kiel kunprezidanto de Svisa Esperanto-Societo mi ricevas ekde merkredo kondolencajn mesaĝojn el la tuta mondo. Mi transdonos ilin al la familio Piron post kelka tempo.

Ĉiuj el ni travivas ŝokon. Ni perdis majstron, konsilanton, fakulon, gvidanton, amikon. Laŭ mesaĝo ricevita hieraŭ el Irano, ni perdis gigantulon.

Claude Piron kapablis ekbrili aĝadekvate kaj efike, respektoplene kaj pozitive kun iu ajn persono, kaj tiu persono sentis sin poste malstreĉita, kuraĝigita, motivita, recentrita en sia personeco kaj en sia energio. Ni perdis anĝelon.

Vivrakonto pri Claude Piron

La 29-an de junio 2008 Mireille Grosjean intervjuis Nicole Piron, la edzinon de Claude, en ŝia hejmo en Gland, Svislando.

Ĉar aperis kelkaj fantaziaj donitaĵoj pri la vivo de Claude Piron en la artikoloj publikigitaj tuj post lia morto, ŝi deziras precizigi kelkajn punktojn.

Claude Piron naskiĝis en Namur, Belgio, la 26-an de februaro 1931. Tie li travivis sian infanecon kaj adoleskulan aĝon. Tie li travivis la duan mondmiliton kaj estis forte ŝokita de tiu brutala evento. Ĉefe la 12-an de majo 1940, kiam la naziaj trupoj invadis Belgion, kaj la 4-an de septembro 1944, kiam la Aliancaj forpuŝis la germanojn, okazis fortaj bombardadoj en Namur. La juna Claude devis fuĝi al kamparo kun sia tuta familio. Ĉiun jaron, kiam revenis tiuj tagoj, li rememoris pri la tragikaj eventoj de la milito.

Li studis en altlernejo en Antverpeno kaj poste en Ĝenevo, Svislando, en la fama altlernejo pri Tradukado kaj Interpretado. Tie li studis la rusan kaj la hispanan dum la jaroj 1952 kaj 1953.

Poste li devis militservi en Belgio. Dum tiu servo li faris la enirkonkurson por la profesio de tradukisto ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj sukcesis.



En la jaro 1956 li iris al Novjorko kaj laboris tie por UN kiel tradukisto, protokolisto kaj redaktisto. Ĉar en 1956 okazis la krizo de Suez kaj la krizo en Budapeŝto en Hungario kaj pro la fakto, ke Claude Piron regis la rusan, lia rolo kiel tradukisto estis ege grava. Ekzemple, li devis resti hejme por povi esti kontaktita kaze de bezono por rapide traduki ion novan. Ĉe UN Piron lertiĝis kaj diplomiĝis pri la ĉina lingvo. Li do regis la kvin lingvojn de UN: la francan, la anglan, la rusan, la hispanan kaj la ĉinan. En tiu tempo la araba ankoraŭ ne estis UN-lingvo. Lia restado en Usono finiĝis en 1961.

Dum tiuj novjorkaj jaroj li konatiĝis kun kolemino, Nicole Sabathé, kaj ili geedziĝis en la jaro 1958. Poste venis en tiu familio tri infanoj. En Novjorko Piron komencis studi psikologion en universitato.

En la jaro 1961 li komencis novan laboron kiel revizoro kaj protokolisto en

Ĝenevo, Svislando, ĉe Monda Organizo pri Sano MOS/OMS. Tio daŭris 10 jarojn ĝis 1971. Dum tiu tempo li ofte devis profesie vojaĝi al Afriko kaj Azio.

En la jaro 1978 li fariĝis svisa civitano. De 1971 ĝis 1975 li studis psikologion en Ĝenevo. Dum tiu studado li jam komencis instrui en la fakultato pri pedagogio de la granda svisa urbo. Li do estis paralele studento kaj profesoro. Li multe aktivis en la Instituto Charles Baudouin en Ĝenevo. Paralele li havis pacientojn por psikoterapio. Ankoraŭ la tagon de sia morto, la 22-an de januaro 2008, li havis pacientojn.

Liaj loĝlokoj estis:

En Belgio, Namur – de 1931 ĝis 1956.
En Usono, Novjorko – de 1956 ĝis 1961.
En Svislando – de 1961 ĝis 2008:
Grand-Lancy (1961–1966), Coppet (1966–1999), Gland (1999–2008).
Li neniam loĝis en Parizo.

Li esperantistiĝis en la aĝo de 9 jaroj. Kun sia frato li intense ekstudis ĝin en la aĝo de 12–13 jaroj.

La tuta familio estis katolika. Claude Piron multe grumbliis kontraŭ la eklezio. Lia spiriteco estis granda. Liaj interesoj estis grandegaj, same liaj interesoj pri iuj religioj. Li havis multajn kontaktojn kun judoj en Novjorko. Tie li aŭdis la jidan lingvon. Li eksciis pri la juda deveno de Zamenhof. Dum la dua mondmilito kaj poste li eksciis pri la Shoa, grandskala mortigo de judoj. Aparta fakto ludis fortan rolon: Claude en la aĝo de 9 jaroj malkovris Esperanton kaj parolis pri tio kun sia instruisto de la elementa lernejo. Tiu ĉi ne ridis, ne primokis, sed aŭskultis respektoplene. Do Claude estis feliĉa. Dum la milito tiu instruisto malaperis kaj probable estis mortigita kiel judo. Tion eksciis Claude Piron. Konsekvence li havis multajn ligojn kun judaismo. «Sed mi neniam aŭdis, ke li havis rektan familian ligon al la judoj» diris Nicole Piron.

30 junio 2008

La 13-an de septembro 2008 okazis renkontiĝo en CDELI en La Chaux-de-Fonds memore al Claude Piron. Foto

de li aperis kovrilpaĝe en la revuo *Esperanto*. La 15-an de novembro 2008 okazis denove seminario en CDELI en La Chaux-de-Fonds memore al Claude Piron. Jen parteto el la prelego de Mario Bélisle ĉe tiu okazo:

«**Solena okazo**

Du jarojn poste (en 1996), Marion kaj mi geedzigis. Je tiu okazo, mi demandis

Claude, ĉu li akceptus esti mia atestanto, dum la geedziga ceremonio. Mi kuraĝis demandi lin, kvankam mi povis imagi, ke li daŭre havas plenplenan kalendaron. Kaj li amike akceptis. Dum la ceremonio, li ankaŭ laŭtlegis tekston de Sankta Paŭlo: «Quand bien même j'aurais le don des langues, sans amour, je ne suis rien» («Eĉ se mi havus


talenton pri lingvoj, mi sen amo estas nenio»). Kaj post tiu ceremonio, dum la bankedo, Claude kaj Nicole sidis ĉe tablo kun ses aliaj Esperanto-parolantaj invititoj, kiuj ĝoje sidis kun ili».

Multe pli oni povas legi pri li en Vikipedio en 9 malsamaj lingvoj. Estas kanalo ĉe YouTube kun liaj prelegoj.

La bona kaj simpla esperantisto

■ Renato Corsetti

Estas malfacile por mi paroli pri Claude Piron, ĉar li estis samtempe mia amiko kaj mia gvidanto. Estas malfacile pensi pri homo, kiu pli ol li influis esperantistojn en la dua duono de la pasinta jarcento, kaj ne prezentis sin kiel influiston, pensomajstron, gravulon. Li aspektis kaj sintenis kiel simpla esperantisto inter simplaj esperantistoj. Li amis la simplajn esperantistojn kaj ĝis la lasta tago de sia vivo li gvidis lokan kurson por komencantoj en sia vilaĝo. El la simplaj esperantistoj li ankaŭ lernis, kiel Esperanto vere funkcias en la realo, en la menso de homoj sen ambicioj krei novan gramatikan aŭ literaturan skolon.



Lia verkaro estas tro vasta por ĉe nur resumi ĝin. Li estis verkanto de romanoj, verkanto de libroj kaj libretoj por defendi Esperanton en naciaj lingvoj, verkanto de lernolibroj (tiu, kiu neniam aŭdis pri Gerda malaperis, levu la manon!), verkanto de sciencaj studoj pri Esperanto, verkanto ankaŭ pri psikologio.

Lia plej konata libro en la studoj pri Esperanto estas *La bona lingvo*. En ĝi li esprimas siajn bazajn ideojn pri la lingvo, kiujn li tamen bazas sur atenta observado pri la parolado de la esperantistaj amasoj. La unua el longa listo de ekzemploj en tiu libro estas la jena: *Mi ne estas tre orema* (t.e. "ema aĉeti oraĵojn", Sarĝah, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, 86.07.17, polino, dum halto

de la al-pekinga aviadilo, antaŭ budo juvelvenda).

Laŭ kelkaj li tro multe atakas kaj draŝas francojn. Fakte li vivis en la tempo de "la franca kun o-finaĵo", alivorte en la tempo, kiam oni provis fari el Esperanto dialekton de la grandaj eŭropaj kulturaj lingvoj kaj nur de ili. Al tio li reagis, kaj li eĉ demisiis el la tiama Akademio de Esperanto. Li estis profesia tradukisto el la ĉina, rusa, angla, franca, hispana. Li krome bone konis kelkajn aliajn lingvojn. Mi memoras pri debato inter mi kaj li pri komparo inter la persa kaj la araba (ambaŭ el ili li studis). Do li ne povis akcepti la enfermiĝon en la eŭropan kulturon de la Esperanto-mondo. Legu lin denove el la libro *La bona lingvo* por kompreni lian sintenon: "Unue, mia ĉina korespondanto enkondukis min en sian lingvon, kaj mi efektive ĝin plu lernis, ĝis, post multaj jaroj, mi ricevis diplomon pri ĝi. Mi do rimarkis, ke er-kombinemo ne estas fantazio mia, sed ke ekzistas lingvoj, en kiuj ĝi estas la normala maniero riĉigi la vortaron. Ŝokis mian senton pri justeco, ke kiam mi, okcidentano, unuafoje en mia vivo renkontas en ĉina teksto la vortojn „helikoptero“ aŭ „teologio“, mi ilin tuj komprenas, malgraŭ la plena ĉineco de ilia aspekto, ĉar ili estas formitaj el jam konataj eroj, dum ĉino lerninta Esperanton devas ĉu diveni laŭ la kunteksto (sed ne ĉiam estas kompreniga kunteksto), ĉu traserĉi vortaron, ĉu miskompreni (teologo unuavide ŝajnas esti fakulo pri teo; ni ja nomas vinologo la fakulon pri vino, kaj en lando, kie estas multaj specoj de teo, kun subtilaj aromnuancoj, ekzistas rilate al teo homoj kompareblaj al vinologoj pri vino). Ankorau nun, la neegaleco sentiĝas dolore: kial mia lingvo stumbligas lin, dum lia min helpas? "



Nun ni vivas en la epoko de "la angla kun o-finaĵo" kaj eble ni devus reagi same kiel li en ĉi tiu nova situacio, kiu prezentas same multe da problemoj por Esperanto, ĉi-foje kaj pri la vort-trezoro kaj pri la gramatika funkciado [demandu anglalingvanon pri la vorto "love": ĉu ĝi estas amo, ami, amu, ama? Li aŭ ŝi ne povas respondi sen kunteksto, kaj eĉ kun kunteksto li aŭ ŝi devas iom pensi]. Ĉiuokaze, indas daŭrigi lian viv-laboron. Pri la vorttrezoro de Esperanto, rigardu foje la retan vortoliston: www.bonalingvo.net. Pri la gramatiko, kiam vi havas dubojn, simple relegu la Fundamenton. Ĉio cetera estas proponoj, ofte de homoj, kiuj ne konis Piron-on.

Anoncetoj:

MONEROJ: Mi aĉetas kaj vendas stelo-monerojn kaj spesmilo-monerojn: esperanto@chello.at

Kalejdoskopo

Heroldo de Esperanto en la portugala

La 2-a numero de *Heroldo de Esperanto* estas sendita al presejo, kune kun la unua numero de la eldono en la portugala lingvo. Tiu eldono havos propran enspezofonton, do temas pri du malsamaj projektoj. La portugala gazeto estas ĉefe por brazilaj neesperantistoj, sed taŭgas ankaŭ por esperantistoj, ĉefe se temas pri komencantoj. Ĝi uzeblas ankaŭ en aliaj portugallingvaj landoj.



Ĝi aperis nun kun nur kvar paĝoj sed la venonta numero devos aperi kun almenaŭ ok paĝoj kaj la celo estas aperigi monatan gazeton kun 16 paĝoj, kiel nun estas la eldono en Esperanto. La portugallingva temaro: Esperanto (historio, literaturo, kulturo), Esperantomovado, lingvoj, poliglota movado, tria sektoro (pri neregistaraj organizaĵoj), ekonomio, politiko, mondo, arto kaj kulturo ĝenerale. La redakcio esperas estonte aperigi ĝin en aliaj lingvoj. La nacilingvaj versioj dividos konvenajn materialojn kun la Esperanta versio, sed tio estos transformita por ekstermovada publiko; krome aperos aparte verkitaĵoj artikoloj.

Ekspozicio pri Ludoviko Zamenhof

La 6-an de novembro oni inaŭguras ekspozicion pri Ludoviko Zamenhof,



organizitan de la ambasadejo de Pollando en Romo kaj de Itala Esperanto-Federacio. "La Kreinto de Esperanto, 1859-1917" estis vizitebla ĝis la 20-a de novembro ĉe la Biblioteko de la Deputita Ĉambro kaj konsistis el vertikalaj paneloj kaj alternaj horizontalaj fenestroj (tekoj, vitrinoj) pri la jenaj temoj: mondaj kaj italaj literaturaĵoj tradukitaj en Esperanton, infanaj libroj, esperantologio, turismaj gvidlibroj, religioj, fotoj atestantaj la sekvojn de nuklea bombado super Hiroŝimo kaj Nagasaki, la paco-premio "Zamenhof" por pli justa mondo, kun fotoj de kelkaj gajnintoj plej konataj en Italio (Moni Ovadia, Tiziano Terzani, Claudio Abbado ktp).

En la inaŭguro partoprenis kvindek da invititoj, ĝeneralaj konsilantoj de ministerioj, diplomatoj, oficistoj de la biblioteko. Inaŭgurajn paroladojn faris la aferŝarĝito de la pollanda ambasadejo s-ino Marta Zielinska-Sliwka, la prezidanto de la Komisiono pri eksterlandaj aferoj de la Deputita Ĉambro Fabrizio Cicchitto, la itala ambasadoro en Norvegio kaj Islando Giorgio Novello kaj la prezidanto de Itala Esperanto-Federacio Michela Lipari, kiu poste gvidis la gastojn por vizito de la ekspozicio.

La itala publika nacia televido filmis la inaŭguron kaj la tutan ekspozicion.

La 11-a MER kaj la 40-a AMO en Moskvo

La 3-an de decembro 2017 en Moskvo, ĉefurbo de Rusio, okazis la 11-a Moskva Esperanto-renkontiĝo (MER), kadre de kiu okazis ankaŭ la unua en Rusio kaj jubilea 40-a laŭorde AMO-Seminario de UEA kun la temo *Publikaj rilatoj kaj Esperanto: tradiciaj amas-komunikiloj, interreto*. Partoprenis 23 esperantistoj el 3 landoj. Kadre de la aranĝo okazis pluraj interesaj prelegoj, prezentadoj kaj komuna kantado de Esperanto-kantoj. Tradicie preskaŭ seninterrompa Esperanto-programo daŭris preskaŭ 9 horojn kaj finiĝis nur malfruvespere. La aranĝon partoprenis ankaŭ la konataj en Esperantujo baroj Mikaelo Bronŝtejn kaj Sergeo Straŝnenko, kiuj prezentis riĉan kantan kaj poezian programon.



Poliglotar 2017 – multlingva evento en Brazilo

La multlingva konferenco *Poliglotar* okazis en la brazila urbo Fortaleza 21–22 oktobro 2017. Tiu evento estas unika, ĉar maloftas konferencoj kies celo estas pritrakti kaj altiri la atenton de brazilanoj pri fremdaj lingvoj.

Poliglotar provas prezenti programerojn al tiuj, kiuj interesiĝas pri la lingvoj ĝenerale, ilia lernado kaj instruado. La unua evento okazis en 2016 kaj estis sukcesa. La ĉi-jara konferenco estis subvenciita de, inter aliaj, Brazila Esperanto-Ligo (BEL), kiu rajtis aliĝi tri esperantistojn kaj donacis al ĉiu aliĝinto bazan lernolibron de Esperanto, la apo Amikumu distri-

buis propagandajn faldfoliojn. En la programero estis tri esperantistoj: Emerson Werneck, kiu kun-organizas la teamon, kiu tradukas la kurson de Esperanto en Duolingo al la portugala, Fabrício Valle, la eldonisto de *Heroldo de Esperanto*, kaj Frederiko Lopes, kiu prelegis pri artefaritaj lingvoj. Notindas, ke unu el la organizantoj de *Poliglolar* estas esperantisto.



Conferência Poliglolar de Fortaleza

La paŭzoj estis ege fruktodonaj. Homoj, kiuj ŝatas lingvojn, babilis kun esperantistoj, kiuj partoprenis la eventon, kaj eksciis iom pri ĝi. Multaj surpriziĝis, ke hodiaŭe estas fluaj parolantoj de Esperanto, kaj montris intereson pli profunde informiĝi pri la lingvo. Entute partoprenis dek Esperanto-parolantoj kaj kvin komencantoj.

Tiu ĉi konferenco estis kulmino de la organizita laboro de la loka poliglota klubo. Poliglolar kluboj celas instigi homojn lerni kaj praktiki diversajn lingvojn, kaj malaltigi la lingvan monotonecon en publikaj spacoj. Nuntempe en Brazilo la poliglolar kluboj multnombriĝas kaj kelkaj estas antaŭenigataj de esperantistoj.

Vi povas trovi pliajn informojn ĉe la retadreso de la evento <http://www.poliglolar.com>.



Sur la foto: Organizantoj de Poliglolar (De la maldekstra al la dekstra): Juliano Martins, Ravik Moreira da Rocha, Hilbernon Almeida (esperantisto), João Paulo Diniz kaj Diego Victor de Sousa

Teatraĵo Lingva Arĥivo

La 3-an de decembro 2017 seŭlaj esperantistoj ĝuis la teatraĵon *Lingva Arĥivo*, kies du aktoroj, s-inoj Klera Bek, Popola Park kaj la reĝisoro s-ro Sung

Kiwoong estas esperantistoj. La scenaro de la teatraĵo estis verkita de Julia Jo, el Usono. En la teatraĵo ĉeestas Zamenhof kaj aperas Esperanto-leciono. Tiu ĉi teatraĵo estas farita ne de iu Esperanto-grupo, sed de konata profesia teatra grupo de Koreio por civitanoj. La spektantoj certe ekinteresiĝos pri Esperanto kaj konscios la gravecon de la lingvo, kiu kunigas la homojn. Kaj la lingvisto, ĉefrolulo en la teatraĵo, emfazas ke eĉ minoritata lingvo devas esti konservata kiel parto de medio-protekto por la homaro. La teatraĵo estis dediĉita por rememorigi la centjariĝon de la morto de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.



UEA-interveno ĉe UN en Ĝenevo dum la 10-a Forumo pri Minoritatoj

Kvar membroj (Nicole Margot, Stefano Keller, Cesco Reale kaj Adrian Tanner) de la Ĝeneva teamo de UEA-reprezentantoj ĉe UN partoprenis la 10-an sesion de la Forumo pri Minoritatoj en la Palaco de Nacioj, la 30-an de novembro kaj 1-an de decembro 2017.

Alparolo dum la 10-a sesio de la Forumo pri Minoritatoj Palaco de Nacioj, UN, Ĝenevo:

Inkluziva edukado kaj partopreno de minoritataj junuloj en la publika vivo Sinjoro Prezidanto, s-ro Speciala Raportisto, karaj reprezentantoj de minoritatoj naciaj aŭ etnaj, religiaj kaj lingvaj, karaj partoprenantoj, saluton! Mi nomiĝas Stefano Keller, kun miaj kolegoj ĉi-ĉeestaj mi reprezentas Universalan Esperanto-Asociacion (UEA), la mondan organizaĵon de la parolantoj de Esperanto, la lingvo internacia. Male ol aliaj lingvoj, Esperanto ne povas havi imperialistajn tendencojn kaj havas nenian ligan kun intereso ekonomiaj aŭ politikaj. Ĝi estas ties lingvo, kiu ĝin elektas, kaj ĝi kreas lingvan egalecon en la komunikado inter la popoloj. Universala Esperanto-Asocio, defendas la lingvajn rajtojn de ĉiuj minoritatoj kaj de ĉiuj indiĝenaj

popoloj, jam ekde pli ol jarcento. Preskaŭ ĉiuj intervenintoj menciis la mankon de eblo por la junuloj de minoritatoj, ricevi edukadon en ilia gepatra lingvo. La rajto al edukado en la gepatra lingvo estas fundamenta rajto, ĉar en nia gepatra lingvo ni komencas malkovri la mondon, komuniki kun la aliaj. En sia gepatra lingvo kapablas ĉiu el ni plej bone lerni, havi edukadon atingante bonajn rezultojn. Nia asocio forte subtenas la klopodojn strebantaj al tiu celo. Ni ŝatus ankaŭ rememorigi pri tio, ke la lernado de Esperanto estas elstara bazo por, krom la gepatra lingvo, lerni pli facile aliajn lingvojn kaj tiel subtenas la malfermiĝon al la respektado de aliaj popoloj. Rekomendoj Karaj partoprenantoj, membroj de minoritatoj kaj decidantoj, ni forte rekomendas al vi studi kaj uzi la Gvidilon pri la realigo de lingvaj rajtoj de lingvaj minoritatoj. Dankon pro via atento, kaj apartan dankon al la interpretistoj voĉaj kaj al iliaj kolegoj, interpretantaj en gestolingvo, por ilia laboro tre grava! Dankon!

La videon spektu ĉe <https://youtu.be/qd0NPMm3STU> (franclingve)

Aperis la 33-a numero de Esperanto en Afriko (la oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA)

Karaj legantoj,

Jen la kvara ĉi-jara numero de la bulteno *Esperanto en Afriko*. Certe ĝi plaĉos al vi, ĉar temas pri sufiĉe diversa kaj abunda numero. Vi legos ĉi-numere ne nur pri la tradiciaj agadkampoj de afrikaj Esperanto-agantoj, sed ankaŭ pri entreprenoj de virinoj en kelkaj landoj kaj pri grupvojaĝo de francaj esperantistoj al Tanzanio, prepare al Nomadkurso – unika projekto, kiu proponas solidaran turismon kaj samtempe la eblon lerni kaj uzi vigle Esperanton.

Mi kaptas la okazon por diri dankon al vi ĉiuj, kiuj iel, ĉu de proksime aŭ malproksime, kontribuis al la vivo kaj flegado de la enkontinenta Esperantomovado. Estis agrable scii, ke vi estis kun Afriko kaj espereble vi plu apudus ĝin ankaŭ en la sekva jaro, sed antaŭe mi deziras feliĉan jarŝanĝon al vi ĉiuj!

Agrablan legadon!

Adjé Adjévi

La bulteno estas senpage elŝutebla ĉe <http://www.esperanto-afriko.org>

Lingvaj rimarkoj

■ Rob Moerbeek

En la LR de la novembra "Esperanto" (2017) mi demandis kial ni povas diri "rigardi al", sed PIV nomas "aŭskulti" transitiva, t.e. rekte transitiva. Mi ne menciis mian supozon, ke tio rilatas la eblon fermi la okulojn, sed apenaŭ la orelojn. Koos Scharroo tamen reagis per cito el PIV mem: *aŭskulti al ies voĉo* (peni ĝin ekkapti). Sed li trovis ankaŭ ke "rigardi al iu/io" ĉiam troviĝas en frazoj kun alisena akuzativo: *rigardi al iu en la vizaĝon*. Laŭ mia interpreto interesa ekzemplo, en kiu la baza signifo de "al" (direkto) transiras al la poseda "al", kiel en "bati la buŝon al iu".

Do mi lernis ke aŭskulti kaj rigardi havas similajn objektojn, jen rektajn (per akuzativo), jen nerektajn per "al", malpli ofte, sed kun aldona nocio de atentostreĉo.

Cetere mankis en la serio du gravaj elementoj: *ankaŭ* kaj *ankoraŭ*.

Multaj verkantoj nekonscie amasigas frazojn kun 'ankaŭ'. Bona stilisto variigas la prezenton per sinonimoj, pli-malpli striktaj:

Venis la urbestro. Venis ankaŭ (ne eĉ!) lia edzino. Sed venis ankaŭ la opoziciestro.

Kial ne uzi "krome, kaj, aldone, triavice, pluse, siavice, post ili, ne mankis..., fine venis"?

Sed ĉu vi finlegis la artikolon pri 'ankaŭ' en PIV, kie ĝi avertas, ke Za-

menhof ja foje metis "ankaŭ" POST persona pronomo: "mi ankaŭ", sed ke tio nuntempe ne estas kutimo? André Cherpillod en sia *Enciklopedieto de Esperanto konforma al la Fundamento* ĉe "Adverboj" mencias 7 adverbojn universalajn, kiuj troviĝu antaŭ la elemento kiun ili elstarigas (pri kiu do validas la sama ago aŭ stato, kiel de jam konata fenomeno). Inter tiuj ja troviĝas "ankaŭ": lerninde!

Kiam mi legas frazkomencan *Ankaŭ* mi jam kaptas la ruĝinkan korektoplumon: ĉu prave?

ANKORAŬ ja ne devus doni problemon, vi protestas. Tamen franclingvanoj kiuj ne ĉiusekunde memoras la frapfrazon de SAT ankaŭ *pensi sen naciece*, emas eĉi "pas encore", anstataŭ la deca "ankoraŭ ne".

Sed mi konscias, ke ... ankaŭ mi ... ankoraŭ ne estas perfekta. Ni lernu kaj lernu.

Esperanto en universitatoj

Du priesperantaj prelegoj en scienca konferenco

■ Dima Ŝevĉenko

La 10-an de novembro en la Rusia universitato de amikeco inter la popoloj (RUDN) okazis la oka Tutrusia sciencpraktika konferenco *Amaskomunikiloj en la multpolusa mondo: problemoj kaj perspektivoj*.

Kadre de la konferenco okazis du priesperantaj prelegoj: *Spertoj de redaktado de la ĉiumonata internacia revuo en Esperanto kun 110-jara historio en la nuntempaj kondiĉoj kaj Apliko de Esperanto en la sociaj retoj en la kondiĉoj de multpolusa mondo*. Dum la unua prelego Anna Striganova rakontis pri



Dmitrij Ŝevĉenko

la oficiala organo de UEA – la revuo *Esperanto* kaj iom pri la Esperanta gazetaro ĝenerale. La dua prelego estis de Dmitrij Ŝevĉenko, kiu rakontis pri la aktuala stato de uzado de Esperanto en la interreto kaj sociaj retoj.

La tezaĵ artikoloj de la prelegoj estos publikigitaj ruslingve en libro fine de novembro 2017.



Anna Striganova

Partoprenantoj de la konferenco



Ni opinias, ke videbligado de Esperanto kadre de la sciencaj konferencoj, forumoj, kongresoj ktp. kaj publikigo de priesperantaj artikoloj en la sciencaj revuoj kaj artikolkolektoj estas bona vojo por montri la lingvon al la ekstera mondo. Ni planas daŭrigi tia-specan agadon kaj proponas al ĉiuj universitataj studentoj, instruistoj kaj aliaj esperantistoj, kiuj havas ligon kun la scienco kaj la universitatoj, fari same.

Esperanto en regiona Parlamento de Brazilo

■ Giuseppe Grattapaglia

La Leĝofara Asembleo de la brazila ŝtato Goiás, en la urbo Goiânia, kunvokis eksterordinaran sesion la 17-an de oktobro, por omaĝi al la *Bieno-Lernejo Bona Espero*, esperantista eduka institucio, pro ĝia 60-jara socia kaj eduka agado en la regiono de Alto Paraiso de Goiás, en la centro de Brazilo.

Fondita en 1957 de ses brazilaj esperantistoj, *Bona Espero*, dum multaj jaroj, edukis kaj alfabetigis centojn da infanoj kaj adoleskantoj el socia riska grupo. Specialan omaĝon ricevis la geedzoj Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, kiuj dediĉis volontule pli ol 40 jarojn de sia vivo por la prospero de *Bona Espero*, helpe de centoj da esperantistaj volontuloj el diversaj landoj.

En aŭditorio plenplena de lokaj aŭtoritatoj kaj gastoj, parolis la Prezidanto de la Instituto *Bona Espero*, adv. Ulisses Riedel, kaj sekvis lin la ŝtata Deputito Santana Gomes, iniciatinto de la ceremonio, kiu en la sepdekaj jaroj ricevis en *Bona Espero* protekton, edukadon kaj alfabetigadon post sia infaneco surstrate. Ĉeestis ankaŭ grupo de ekslernantoj, nun jam profesiuloj el pluraj urboj de la ŝtato Goiás.



Post la periodo de alfabetigado kaj protekto de infanoj, la nuntempaj programoj kaj projektoj de *Bona Espero* celas medi-protektadon, agro-ekologion, vegetaranismon kaj kursojn pri daŭripoveco en partnerecoj kun la ŝtata eduka departemento.

Jam de pluraj jaroj *Bona Espero* kunlaboras partnerece kun la neregistara organizaĵo *União Planetária* (Unio Planeta) en Brasília, kaj okupiĝas pri la Esperanto-agado de ĝia televid-kanalo *TVSUPREN*, en revuoj kaj ĵurnaloj kaj aliaj eldonaĵoj de tiu senprofita organizo.


Eventoj de skoltaj kaj rotarianoj, de esperantistoj kaj aliaj grupoj nun

okazas, kie antaŭe ŝvarmis infanoj. La bieno-lernejo *Bona Espero* estas daŭra propaganda kaj informa loko, eĉ nur per sia ekzisto kiel Esperanto-organizo. Ĝi troviĝas meze de fama ekologie turisma regiono, apud la Nacia Parko *Çapada dos Veadeiros*, kaj multaj turistoj daŭre vizitadas la institucion serĉante informojn pri Esperanto kaj admirante la riĉan bibliotekon de Esperanto-libroj.

Esperanto-parolantaj volontuloj ĉiam aperas kaj iĝas allogo de la momento por la lokaj loĝantoj, ĉar ili povas vidi, ke la lingvo estas ne celo, sed rimedo por perfekta komunikado inter malsamaj kulturoj.

Forpasoj

Stanislaw Mielczarek (1942–2017)



Stanislaw Mielczarek naskiĝis en Pollando la 14-an de novembro 1942, eklernis Esperanton en 1956 kaj en 1970 translokiĝis kun sia edzino Henryka al Danio, laŭ invito de Betty Larsen, do pere de Esperanto. Stanislaw tuj iĝis membro de Århus Esperantoforening (la Esperantoklubo de Århus) kaj aktivis pri Esperanto, loke kaj lande, i.a. dum multaj jaroj kiel estrarano de Dana Esperanto-Asoocio kaj prizorganto de la Prelegvojaĝa servo. De 1997 ĝis sia morto Stanislaw

estis prezidanto de Århus Esperantoforening. La 29-an de oktobro li forpasis post kelkaj malsano.

Aleksandr Kerbel (1930–2017)

La 10-an de junio, 86-jara, s-ro Kerbel forpasis en Hajfa, Israelo. Naskiĝinta en Kievo, Ukrainio, li iĝis elektroteknikisto; lerninte Esperanton en 1966, li tuj ekaktivis en la Kieva movado. Ankaŭ post la enmigro en Israelon en 1975 li daŭrigis sian agadon etendante ĝin sur la literaturan kampon. Lia ĉefverko iĝis la tri-voluma *Esperanto per 501 vortoj* – rektameta lernilo per legado de 3 re-rakontitaj romanoj. Krome li verkis kaj komponis kantojn, sed plejparte elrusigadis prozaĵojn: hu-

murajn romanojn de Ilja Ilf kaj Evgenij Petrov, sciencfikciajn romanojn de Arkadij kaj Boris Strugackij kaj plurajn aliajn. Fakdelegito pri stenografio (1982–2015), li estis delegito de Hajfa ĝis sia forpaso.


Liana Elaŝvili (1955–2017)

S-ino Elaŝvili, delegito de Bat-Jam, Israelo, kaj fakdelegito pri ĵurnalismo kaj la kartvela lingvo ekde 2003, forpasis la 29-an de junio. Naskiĝinta en Tbilisi ŝi esperantistiĝis en 1970 kaj apud sia profesia laboro instruadis Esperanton. Post la enmigro en Israelon en 1991 ŝi daŭrigis sian ĵurnalismon per la kartvela kaj ekaktivis en la Tel-Aviva E-Klubo.



Ekde la 3-a numero, **Esperanto** estas oficiale menciata sur la paĝaro de la Unesko-retejo, kaj en ĉiuj lingvaj versioj de la **Kuriero**. La Esperanto-versio estas elŝutebla ĉe la Unesko-retejo <https://en.unesco.org/courier/about>.

Subtenu la projekton per viaj elŝutoj ĉe la Unesko-retejo kaj financa donaco al la UEA-fondaĵo Unesko (Kuriero).



Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj

Leah Levin. Trad. Edmund Grimley Evans.
Gvidlibro de Unesko por antaŭenigi kaj protekti homajn rajtojn.
Rotterdam: UEA, 1998.
140p. 21cm. 7,50 €. Triona rabato ekde 3 ekz.

Kio estas demokratio?

80 demandoj kaj respondoj
David Beetham kaj Kevin Boyle. Trad. Geoffrey Sutton.
Facile komprenebla manlibro pri la esenco, celoj kaj praktika funkciado de demokratio.
Rotterdam: UEA, 2000. 143p.
21cm. 7,50 €. Triona rabato ekde 3 ekz.



Paĉjo, kio estas rasismo?

Tahar Ben Jelloun. Trad. Armela Le Quint kaj Ĵak Le Puil.
Dialogo inter patro kaj filino pri tikla temo.
Rotterdam: UEA, 1999. 52p.
19cm. 4,80 €. Triona rabato ekde 3 ekz.

Fundamento de la homaj rajtoj

Entenas ankaŭ "Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj", "Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj" kaj "Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj".
Rotterdam: UEA, 2016.
96 paĝoj, 15 cm
6,90 €. Triona rabato ekde 3 ekz.

